


Revuo
ESPERANTO
Internacia

N-ro 600 (11) NOVEMBRO 1955



La Internacia Labor-Organizaĵo

(vidu paĝon 315)

Fondinto : H. HODLER

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Honora Redaktoro : HANS JAKOB

Jara abono (1955) : 15 ŝil. anglaj (kun membreco kaj jarlibro 20 ŝil.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj

Ĉion por la redakcio oni sendu al Redaktoro : W. AULD

Knockfarril, Thornside Road, Johnstone, Renfrewshire, Skotlando

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo £6 ½ paĝo £3

¼ paĝo 30 ŝil. ⅓ paĝo 15 ŝil.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo ESPERANTO, abonado, reklamoj, anoncetoj sendu al

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Eendrachtsweg 7, Rotterdam C., Nederlando

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ 1 int. respond kupono por ĉiu duoj da vortoj

Legantoj en 80 landoj

Eldonnumero 6250



Enhavo

							paĝo
La oficejo de U.E.A. en Rotterdam	..	..	..	..	..	..	305
Komuniko de la Estraro	..	..	..	..	..	..	306
Dankesprimo. Hans Jakob	..	..	..	..	..	..	308
La Internacia Labor-Organizaĵo	..	..	..	..	..	..	315
Raporto pri la Belarta Konkurso	..	..	..	..	..	..	321
La junulino, la ĉapelo kaj mi. J. H. Rosbach		..	..	..	..	..	323
Intervjuo	..	..	..	..	..	..	328
La redakcio de Esperanto. E. Malmgren	..	..	..	..	..	..	330
Vagado sub palmoj (4). J. Ribillard	..	..	..	..	..	..	332
Poezio							
Balado pri la polko. J. Neruda (J. Kozinek)	..	..	..	..	..	..	322
Alvoko al amo. M. Boulton	..	..	..	..	..	..	327
Rubrikoj							
Centro de Esploroj kaj Dokumentado	..	..	..	..	..	..	308
Tra la mondo esperantista	..	..	..	..	..	..	309
Esperantista vivo	..	..	..	..	..	..	331
Nekrologo	..	..	..	..	..	..	331
Nia forumo	..	..	..	..	..	..	335
Novaj libroj	..	..	..	..	..	..	336
Radio	..	..	..	..	..	..	338
Oficiala Informilo	..	..	..	..	..	..	339
Internacia konkurso	..	..	..	..	..	..	340

Revuo

ESPERANTO

Internacia

N-ro 600

Novembro 1955



La Oficejo de U.E.A. en Rotterdam

Ek de la 15-a de novembro funkcias en Rotterdam la Administra Oficejo de UEA je la adreso :—

Universala Esperanto-Asocio
Eendrachtsweg 7, Rotterdam C, Nederlando

La 5-an de novembro UEA fermis sian oficejon en Heronsgate kaj inter la 5-a kaj 15-a de novembro okazas la transporto de la oficeja ilaro de Heronsgate al Rotterdam. Sekve, post la 5-a de novembro *ne plu skribu al Heronsgate* kaj post la 15-a de novembro 1955 ĉiujn korespondaĵojn, pagojn, mendojn, abonojn, aliĝojn k.t.p., mallonge ĉion, pri kio vi ĝis nun skribis al la adreso en Heronsgate, *bonvolu adresi al Universala Esperanto Asocio, Eendrachtsweg 7, Rotterdam C, Nederlando.*

* * *

Rotterdam estas la urbo de Erasmo, la granda humanisto kaj filozofo de la vero kontraŭ la superstiĉoj kaj ignorado.

Rotterdam estas la nodpunkto de internacia kaj interkontinenta komerco, trafiko kaj ĉiaspecaj interŝanĝoj.

Rotterdam, unu el la plej suferintaj viktimoj de la mondmilito, leviĝis el cindro kaj ruinoj per siaj propraj fortoj.

Se estas vero, ke la urboj havas ne nur sian fizikan aspekton, sed ankaŭ sian spiritan fizionomion, tiam la animon de Rotterdam ornamas filozofia saĝo, aŭdaca praktikemo kaj senfina kuraĝo. Medion pli taŭgan kaj konforman al la celoj kaj idealoj de Movado kiel la nia malfacile oni povas imagi. La hazardo eĉ volis, ke la Asocio trovu hejmon precize en la bela kaj fama Eendrachtsweg, kio signifas "Strato de Konkordo".

La spirito de Rotterdam animu nian laboron kaj la nomo de la strato simbulu nian unuecon !

I.L.

Komuniko de la Estraro

Pasis nur tri monatoj de la kongreso en Bologna kaj la Estraro jam povas anonci la ĝojigan sciigon, ke ek de la 15a de novembro funkcias en Rotterdam, en unu el ĝiaj plej belaj stratoj (Eendrachtsweg 7), la nova Administra Oficejo de UEA. F-ino M. H. Vermaas, la nova administrantino de la Asocio, solvis la problemon ne nur rapidege sed ankaŭ perfekte kaj celtrafe: UEA havas nun tre dignan oficejon, kiu plene respondas al la nuntempaj bezonoj de la Movado kaj al la rolo, kiun ludas la Asocio. Krome, la jara lupago estos konsiderinde malpli alta ol estis la jaraj elspezoj por vivteno de la propra domo de la Asocio en Heronsgate. Dankon al ŝi kaj al roterdamaj esperantistoj, kiuj kun kanto sur la lipoj helpis en liberaj horoj al plibeligo de la nova oficejo!

Intertempe la oficejo en Heronsgate seninterrompe kaj glate funkciis. Dumtempaj geoficistoj sukcesis en nuraj kelkaj tagoj bone enkondukiĝi en la administradon. La rezultojn ĉiuj povis konstati: la ĉefdelegitoj kaj perantoj jam ricevis la reviziitan materialon rilate la membraron por 1956; la septembra, oktobra kaj novembra numeroj de la gazeto estis ĝustatempe ekspeditaj; la Jarlibro, dua parto, jam kompostita, nun presata kaj ekspedota en tiu ĉi monato laŭ antaŭpreparitaj adresoj; la bazaj laboroj por la Jarlibro 1956 (publikigota en marto) jam faritaj; centoj da cirkuleroj forsenditaj en pluraj okazoj. Eĉ ne dum sekundo la laboro stagnis! La 5an de novembro la oficejo en Heronsgate estis fermita. La maŝinoj kaj la pli valora meblaro transportitaj al Rotterdam. La Esperanto-Domo en Heronsgate apud Londono estos vendita kaj la vendosumo estos utiligata por la celoj de la Esperanto-movado. Siatempe grandanima meceno donacis la domon en kriza periodo, kaj dum preskaŭ 20 jaroj ĝi servis nin kiel Centra Oficejo. Dankon al la donacinto kaj al ĉiuj kiuj en ĝi laboris por la bono de la Esperantismo!

Malgraŭ pluraj kaj gravaj malfacilaĵoj en la administrado, venkitaj sukcese en rekorda tempo, la Asocio kaj CED dediĉis ankaŭ al la aliaj taskoj grandan atenton. La Kongresa Rezolucio estis transdonita al diversaj registaroj (la prezidanto transdonis ĝin en la rusa lingvo ankaŭ al Soveta ambasadoro en Stockholm, kiu plusendis ĝin al sia registaro). La Asocio estis reprezentita en la Konferenco de UNESKO por neregistaraj organizaĵoj en Parizo la 6an kaj 7an de septembro (S-ro Llech-Walter kaj P. Petit). La 21an de septembro estis transdonita al Eŭropa Konsilantaro abunde dokumentita Petskribo por havigi al la Asocio konsultajn aranĝojn kun tiu Organizaĵo. La Informa Fako estas renovigita kaj al ĉiuj kunlaborantoj estas sendita la bulteno de la Internacia Gazetara Servo kun kelkaj konsiloj pri agado sur la kampo de informado. Estas organizita nova signifa aktiveco: eldonado de speciala ĉiumonata bulteno por la Esperanto-gazetaro kun novaĵoj pri UNESKO (la unua numero aperis en septembro). Al ĉiuj landaj asocioj estas donitaj konsiloj kaj sugestoj pri reprezentiĝo en la naciaj UNESKO-komisionoj kaj pri la eblecoj enkonduki Esperanton en la lernejojn, kiuj partoprenas en la t.n. eksperimentaj aktivecoj de UNESKO.

Granda parto de tiuj laboroj povis esti plenumita dank' al la dokumenta materialo liverita de la Centro de Esploro kaj Dokumentado. CED intensigis sian laboron kaj en septembro eldonis kaj dissendis 3 novajn dokumentojn, entreprenis grandskalan enketon pri geinstruistoj-esperantistoj kaj pri la lernejoj en kiuj Esperanto estas instruata; plue ĝi daŭrigis la enketon pri Esperanto-libroj en publikaj bibliotekoj, kompletigis la Esperantan Bibliografion, ĵus finis la laboron rilate Esperantajn tradukojn por Index Translationum kaj entreprenis plurajn aliajn malpli gravajn taskojn.

Niaj ĉefdelegitoj, perantoj kaj delegitoj komencis kolektadi la kotizojn por la jaro 1956 kaj varbadi novajn membrojn. Ĉiutage alvenas spezfolioj kaj kreskas la membraro ne nur por la jaro 1955, sed ankaŭ por 1956. Tre kredeble en tiu ĉi jaro UEA atingos preskaŭ 20,000 membrojn. Tio montras la kontentecon de la Esperantistaro pro la laboro kaj atingoj de la Asocio.

Ĉie estas rimarkebla nova entuziasmo, kiu animas la laboron. UEA sukcese agas por Esperanto. La gvidaj instancoj de la Asocio plenumas kaj plenumos sian devon. Ĉiu esperantisto faru la sian. Aliĝu grandskale al UEA, se iel eble kiel MA aŭ MS, ĉar nur forta UEA estas garantio por la estonteco.

E. Malmgren

D. Kennedy

I. Lapenna

R. Llech-Walter

P. M. Mabesoone

Protekto de la Kulturaj Valoroj en Okazo de Armita Konflikto

La Internacia Konvencio por la Protekto de la Kultura Proprieto en Okazo de Armita Konflikto estas jam ratifita de Egiptujo. Estas interese rimarkigi, ke Egiptujo kun siaj riĉaj kulturaj kaj artaj trezoroj estis la unua lando, kiu ratifis la Konvencion.

La Konvencion akceptis interŝtata konferenco en Hago, kunvokita de UNESCO, la 14-an de Majo 1954. La signo, sub kiu estos protektataj la kulturaj kaj artaj valoroj, estas flago kun blua kaj blanka kampoj. Ĉiuj monumentoj, havantaj tiun signon, estos protektataj simile kiel la "ruĝa kruco" protektas hospitalojn, ambulancojn, medicinan personaron dum la milito. La Konvencio ankaŭ antaŭvidas, ke ĉe UNESCO estos formita speciala registro pri monumentoj, kiuj ĝuos eksterordinaran protekton en okazo de milito. La Konvencio ricevos juran forton, kiam ĝin ratifos kvin ŝtatoj.

Fotografiaĵoj pri Pentraĵoj en la Ajanta-kavo

La usona arkeologo David L. De Harport ĵus finis la fotografadon de la muraj pentraĵoj en la famaj temploj de la Ajanta-kavoj en la ŝtato Hyderabad, Hindujo. La pentraĵoj estis farataj de budistaj pastroj dum pluraj jarcentoj.

Albumo de 32 reproduktaĵoj de tiuj ĉi belegaj freskoj estis eldonita en la lasta jaro en New-York en la "Monda Arto-Serio" de UNESCO. Poste oni decidis fari pli kompletajn esplorojn kaj studojn de la pentraĵoj. Estis atingita interkonsento inter la hindaj aŭtoritatoj kaj UNESCO, rezulte de kio S-ro De Harport, en kunlaboro kun la kuratoro de Ajanta, S-ro Abdul Wahid, faris kompletan kolekton de fotografiaĵoj pri la freskoj, troviĝantaj en la 13 grotoj. La kolekto konsistas el 580 fotografiaĵoj nigraj-blankaj kaj 580 en koloroj. UNESCO intencas utiligi la fotojn por moviĝanta ekspozicio, kiu estos prezentita en la ŝtatoj membroj.

Eŭropa Premio por Literaturo

La Eŭropa asocio de libro-societoj kaj kluboj, sub la aŭspicioj de la Eŭropa Kultura Centro, donos la 15-an de junio 1956 en Genevo gravan literaturan premion por romano aŭ biografio, ĝis nun ne publikigita, havanta altan literaturan nivelon kaj kun tia karaktero, ke ĝi pravigas la tradukon en plurajn lingvojn. La premio estas 10,000 svisaj frankoj. La verko povas esti skribita en kiu ajn lingvo. La manuskripto devas havi inter 200 kaj 400 paĝoj kun interspaco. La prijuĝa komitato konsistas el Jean Giono, Ignazio Silone, Stephen Spender, Frank Thiess, H. Dressler, Denis de Rougement.

Pliajn detalojn oni povas ricevi de : Centre Européen de la Culture, Villa Moynier, 122, Rue de Lausanne, Genève, Svislando.

Dokumentaro pri la Uzado de Atoma Energio por Pacaj Celoj

Pluraj ŝtatoj konsentis liveri al UN dokumentojn pri siaj esploroj koncerne la porpacan utiligon de la atoma energio. Tiu ĉi materialo estas disponigata al ĵurnalistoj en la Informaj Centroj de Unuiĝintaj Nacioj en diversaj landoj.

Longludaj Diskoj pri Nuntempa Muziko kaj Popola Muziko

La Internacia Muzika Konsilantaro preparas du novajn seriojn de Longludaj diskoj : Antologion de Nuntempa Muziko kaj Mondan Kolekton de Popola Muziko. Ambaŭ serioj estos eldonitaj kun la helpo de UNESKO.

Por la Internacia Antologio de Nuntempa Muziko estas elektitaj verkoj de elstaraj komponistoj el trideko da landoj, kies komponaĵoj ankoraŭ ne estis registrita aŭ

ne estis vaste prezentitaj en la disko-katalogoj ekster iliaj propraj landoj. La unua gramofondisko, dediĉita al la gvidaj komponistoj de Italujo kaj Francujo, enhavas la verkon "Simfonio n-ro 1" de la franca komponisto Henri Dutilleux kaj "Coro di Morti" de la itala komponisto Goffredo Petrassi.

En la nova kolekto de la Folkloro Muziko la kantoj kaj dancoj ne estos grupigitaj, kiel ĝis nun, laŭ la landoj, sed laŭ ilia rolo en la vivo de la popoloj : amkantoj kaj nuptaj kantoj, funebraj kantoj, laboraj kantoj ktp. Pli ol tridek landoj estos reprezentitaj : de Japanujo ĝis Aŭstrio, de Formozo ĝis Ukraino, de Arktiko ĝis Etiopio. Por certigi aŭtentikecon de stilo, enhavo kaj interpretado, la registradoj okazis en la lokoj mem de la origino. Ludis aŭtentikaj popolaj muzikistoj. Ambaŭ seriojn oni povas mendi ĉe : International Music Council, UNESCO House, 19, Av. Kléber, Paris 16, Franclando.

(Laŭ UNESCO Features)

Dankesprimo

Okaze de mia 50-jara jubileo de partopreno en la Esperanto-Movado mi ricevis multnombrajn gratulojn de amikoj kaj kunlaborantoj el ĉiuj landoj. Ne povante respondi individue mi petas akcepti mian elkoran dankon.

Hans Jakob, Honora Redaktoro



Centro de Esploro kaj Dokumentado

300, West End Lane, London, N.W.6, Anglujo

Grava alvoko al niaj geinstruistoj

CED denove atentigas pri la alvoko en la septembra n-ro de *Esperanto*, p. 267. Al la geinstruistoj, kiuj jam respondis, CED esprimas sian koran dankon. Por sukcesigi la enketojn estas tre grave, ke la respondoj estu kiel eble plej nultenombraj. Antaŭ ol entrepreni iun ajn plian paŝon rilate la instruadon de Esperanto en la lernejoj, estas absolute necese havi klaran bildon, unuflanke, pri la disponeblaj fortoj, nome pri la geinstruistoj-esperantistoj pretaj en okazo de bezono instrui Esperanton en la lernejoj, kaj aliflanke pri la nuna state de la instruado de nia lingvo en la lernejoj de diversaj landoj. Sen tiuj scioj ne estas eble entrepreni iun ajn seriozan paŝon ĉe la internaciaj kaj naciaj instancoj. Tial CED ankoraŭfoje apelacias al ĉiuj geinstruistoj relegi la demandojn en la septembra n-ro de *Esperanto* kaj sendi la respondojn sur p.-karto aŭ aparta papero al kunlaboranto de CED pri lernejaj demandoj S-ro David Kennedy, 21 Westfield Road, Bishop Auckland, Co. Durham, Britujo.



Tra la Mondo Esperantista

Ni petas regulajn raportojn aŭ raportetojn el ĉiuj mondpartoj por tiu ĉi rubriko, por ke ĝi prezentu tutampleksan bildon pri agado, eventoj kaj interesaĵoj el la Esperanta mondo.

Austrujo

Kompaniano de la *Neydhartinger Kurhaus* (Neydhartinga kurac-baneja kompanio) en *Lambach*, S-ro *Otto Stöber* (kiu en 1918 fondis la Aŭstrian Laboristan Ligon Esperantistan), starigis fondaĵon nomatan: **D-ro Zamenhof-Esperanto-Fondaĵo**, kiu celas ĉiujare havigi al kvin personoj aktive agantaj en la esperanto-movado 14-tagan senkoston kurac-restadon en la nomita Banejo. La kvin gastoj ricevas senpagan nutradon, poŝmonon kaj vojaĝkostojn de la aŭstria landlimo ĝis la Banejo kaj returne. Aspirantoj notu jenajn ĉefajn kondiĉojn:—

Ili devas esti minimume kvin jarojn aktiva membro de esperanto-societo; ili devas fari du maŝinskribitajn paĝojn da laboro en Esperanto el la kampo de la historio de la esperanto-movado kaj ĝin transdoni al la kuratoraro kun rajto de publikigo, aŭ esti aktiva en iu kampo de la esperanto-movado; kaj ili devas esti rekomendataj de sia kompetenta esperanto-organizo. Petskriboj devas esti prezentitaj al la kuratoraro plej laste la 11-an de decembro de ĉiu jaro.

Oni kreis ankaŭ la **Neydhartingan Zamenhof-medalon**, per kiu oni ĉiujare distingos maksimume kvin meritplenajn esperantistojn. La medalo estas el oro.

* * *

De la 12a ĝis la 18a de aŭgusto 1956 okazos en Vieno la *XVIIa Internacia Kongreso de Abelbredistoj*, dum kiu oni oficiale parolados angle, france kaj germane kaj uzos modernan interpretaparaton. Sed

la esperantistaj abelistoj intencas obei la admonon de D-ro *Privat*, kaj demonstri antaŭ internacia publiko neesperantista la unikan destinton kaj funkcion de la internacia lingvo. La abelistoj-samideanoj en Aŭstrujo jam projektas programon ĉirkaŭ la mondfama abelspeco *Carnica* kaj unu el la plej gravaj abelbredistoj en Eŭropo. Por komenci la aranĝadon ili devos baldaŭ scii, kiom da abelistoj esperantistaj intencas partopreni tiun kongreson. Tiuj estas petataj sendi al UEA sian adreson kaj deziresprimojn pri la programo kaj utiligo de Esperanto dum la kongreso. Samideanoj, precipe ekster la teritorioj de la angla, franca kaj germana lingvoj, atentigu abelistojn de vi konatajn, kaj instigu ilin al partopreno kaj deziresprimo al la kongreso, ke ĝi uzigu Esperanton ankaŭ por ĉiuj siaj oficialaĵoj.

Brazilo

Okazis la 3an de oktobro balotado por la Prezidenteco de Brazilo. Unu el la kvar kandidatoj estis Dumviva Membro de Brazila Esperanto-Ligo kaj de Universala Esperanto-Asocio, *D-ro Ademar de Barros*. Intervjuate de la grava revuo "*Manchete*" (eldono de la 2a de aŭgusto 1955), D-ro Ademar de Barros deklaris, ke li havas amikojn en Ameriko kaj en Eŭropo, kaj ke li estas universalisto kaj partiano de la paco kaj de Esperanto. Dum du oficperiodoj li jam regis la grandan ŝtaton São Paulo kun eksterordinara aktiveco kaj efiko.

Bedaŭrinde, en la presmomento ni ankoraŭ ne sciigis pri la rezulto de la balotado. Tamen salutojn por nia eminenta samideano oni povas direkti al: D-ro Ademar de Barros, Rua Mexico 3—sobreloja, Rio de Janeiro.

Ĉeĥoslovakio

Dum la dua duono de julio venis por la deka fojo al *Doksy* spertaj esperantistoj kaj novaj adeptoj por partopreni kolegian instruadon. Ĉeestis pli ol 80. Prelegis *Ginz, Plč, D-ro Pumpr, D-ro Seppová, Slanina, Suchardová, Špur* kaj *Vítek*. Antaŭtagmeze de la oka ĝis la dekdua horoj okazis regula instruado, posttagmeze kutime oni ripozis ĉe la lago, kaj vespere prezentiĝis diversaj kulturaj kaj amuzaj programoj. La vespero de *Verda Ĉaro de J. Baghy* estis aparte neforgesebla.

Francujo

Kiel rezulto de la UNESKO-rezolucio, UEA estis invitata partopreni la laborojn de kunsido de la *internaciaj neregistaraj asocioj* en Parizo la 6an kaj 7an de septembro. Pli ol cent delegitoj ĉeestis la Kunvenojn. S-roj *René Llech-Walter* (Estrarano) kaj *Pierre Petit* (Komitatano) reprezentis UEA.

La laboro dividiĝis en ses Sekciojn: Edukado, Ekzaktaj kaj Naturaj Sciencoj, Socialaj Sciencoj, Pri-kulturaj Aktivecoj, Informado, kaj Interŝanĝo de personoj. S-ro Llech-Walter ĉeestis la kvar kunsidojn de la fako Edukado, kaj S-ro Petit la du prelegojn "Pri kulturaj aktivecoj" kaj unu kunsidon de la fako Interŝanĝo de personoj. Kiel Prezidantoj de Popolaj Universitatoj, niaj Delegitoj povis partopreni kun kompetenteco la laborkunsidojn.


El la konkludoj akceptitaj ni citas jenajn:—

La grupo Edukado aprobas la fakojn elektitajn de la Ĝenerala Kunsido, kaj ekstudas la sekvantan ĉefan projekton: "Studado pri la baroj, kiuj kontraŭstaras la internacian interkompreniĝon, kaj efika rimedo por ties forigo."

La grupo Edukado deziras, ke tio estu precizigata, ke la Ŝtatoj-anoj de UNESKO estu insiste petataj doni specialan helpadon al la internaciaj organizoj, kiuj havas sidejon en la koncernaj landoj, kaj kiuj estas komisiitaj starigi Centron de Dokumentaro specialigita pri unu el la diversaj aspektoj de la Edukado.

S-ro Llech-Walter sukcesis havi specialan intervjuon kun S-ro *Hercik*, Fakestro de la Internaciaj Neregistaraj Asocioj, kiu tre afable donis al li ĉian dezirindan dokumentaron pri la agado de UNESKO. S-roj Petit kaj Llech-Walter vizitis poste S-ron *Lebar*, Delegito de UNESKO ĉe la Universala Kongreso en Zagreb, kaj ankaŭ plurajn fakestrojn, kiujn ili atentigis pri la pli granda valoro de la revuo de UNESKO "*Diogeno*", se ĝi eldoniĝus ankaŭ esperantlingve.

Dum la lasta kunveno de la Kunsido, S-ro Petit parolis pri popolaj universitatoj. UNESKO multe interesiĝas pri tiuj universitatoj, sed fakte ne scias multon pri ili. Sekve S-ro Petit proponis fari enketon pere



Okaze de balo organizita de la esperanto-grupo "Unueco" en Saint-Claud, Francujo, la 30an de julio, oni elektis "Fraŭlinon Esperanto" kaj ŝiajn du honorajn fraŭlinojn. Fraŭlino Esperanto (meze) estas **Annie Vallant**, Cellefrouin (Charente). Ŝiaj honoraj fraŭlinoj estas: (maldekstre) **F-ino Ginette Artaud**, Cellefrouin (Charente), kaj (dekstre) **F-ino Simone Leger**, Chasseneuil (Charente). Gratulesprimojn oni povas direkti al la donitaj adresoj.

de Esperanto. *La gvidantoj de landaj asocioj kaj lokaj grupoj en lokoj, kie ekzistas tiaj universitatoj, estas petataj sendi al S-ro Petit jenajn detalojn pri ili: celoj, nomoj kaj adresoj de la gvidantoj, ĉu ili estas kunigitaj, kaj ĉu ili estus emaj aliĝi al internacia organizo de popolaj universitatoj kun helpo de UNESKO.* Helpu tiun gravan aferon.

Sendu informojn al S-ro Pierre Petit, 26 rue Rochebrune, Rosny Sous Bois (Seine), Francujo.

* * *

La francaj esperantistaj asocioj ofte ricevas leterojn pri la plej taŭga maniero eklerni la francan lingvon aŭ plibonigi sian konon pri ĝi. Tial la Kulturdomo de la Esperantistoj (Kastelo de Grésillon, en Bauge, Francujo, kun helpo de la Unuiĝo Esperantista Franca kaj de la Grupo de la Esperantistaj Edukistoj, decidis organizi kursojn por la geesperantistoj, kiuj deziras plibonigi sian konon de la franca lingvo. Tiuj kursoj okazos, la unuan fojon, de la 15a ĝis la 31a de julio, 1956, en la Kulturdomo mem. Ĉiuj informoj estas riceveblaj kontraŭ internacia respondkuponon de:

S-ro H. Micard, Kulturdomo de Grésillon, Bauge (M & L), Francujo.

S-ro Thebaud, Cours Complémentaire de Jeunes Filles, Caudry (Nord), Francujo.

S-ro A Ribot, 11 rue Vergnes, Marmande (L & G), Francujo.

Hispanujo

La altranga kultura gazeto "Revista" en Barcelona organizis konkurson por raportoj. S-ro *Delfi Dalmau* gajnis la unuan premion per raporto pri Esperanto, kaj lia verko aperis en la gazeto (15-21 sept.) sur kvar kolumnoj, kun portreto de Zamenhof kaj la Kongresfoto el Bologna.

Hungarujo

Post la bonsukcesa kaj efika modesta regiona esperantista packunveno de sudhungarlandaj esperantistoj en Hódmezővásárhely la "Paco" Esperanto-

Rondo de la V-a distr.—Kulturhejmo en Budapeŝt aranĝis en la ĉambrego de la Kulturhejmo malgrandan landan packunvenon, kiun partoprenis ges-doĵ el 11 lokoj, la 18-an de septembro. La antaŭan vesperon multaj kunvenis por amika interkonatiĝo en la Klubo de Artistoj. La konferencon partoprenis proks. 55 kaj oni aŭskultis kun intereso la referaton de S-ro *Márton Lajos* pri la necesa utiligo de Esperanto en la socialistaj landoj. Tiun verkis K-do *J. Nagy*, kiu pro malsano ne povis ĉeesti. Sekvis referato de S-do *P. Balkányi* pri Mondpaca Esp. Movado kaj ĝenerala internacia progreso de Esp., de S-do *Márton* pri Sindikata Esp. As. Tutmonda, de S-do *Imre Ferenczi* pri la junulara laboro. Inter la alparoloj estis la plej gravaj: de S-dino *Julia Tóth* raportante, ke en urbo Hódmezővásárhely en la urba "Petöfi" Kulturhejmo estis solena fondiĝ-festo de Esperanto Rondo. La budapeŝtan rondon reprezentis kaj festparoladon diris S-do *Julio Baghy*—de Miskolca junulo *Kiss*, kiu raportis, ke en tiea uzino komenciĝas oficiala esp. kurso. En la kunveno de la urba packomitato okazis du alparoloj pri Esperanto. Post diversaj proponoj oni entuziasme akceptis la proponon de S-do *Georgo Onódi*, ke oni elektu provizoran Landan Konsultan Komitaton. Al diversaj postenoj honoraj ni mencias nur kelkajn: Prezidanto *Julio Baghy*—kiu prezidis la kunvenon, sed pro malvarmumo ne povis fari paroladon je ĉies bedaŭrego—Organizaj aferoj: *Lajos Márton*, Lingvistaj aferoj: D-ro *K. Kalocsay*, Kulturaj, literaturaj aferoj: *Julio Baghy*, Internaciaj rilatoj: *P. Balkányi*, Packomitatoj: S-inoj *Kenesei, Chirer*, instruado: Prof. *Pechán*. La komitaton oni kompletigos. Instruisto *Imre Vágé* en Pécs ankaŭ nunjare komencis kurson por 15 gelernantoj. Multaj dezirus aboni esperanto-revuojn, sed tion nuntempe ne estas solvebla. Oni dankas al eksterlandaj amikoj, kiuj helpas la sendon kaj abonon de revuoj, libroj kaj oni sendis salutleterojn al UEA, al MEM, al SAT, al *Heroldo* ktp. kaj al hungaraj instancoj.

Italujo

De la 7a ĝis la 14a de aŭgusto disvolviĝis en *L'Aquila* (Italujo), meze de la rava monta pejzaĝo de Abruco, la 11a Internacia Junular-Kunveno, organizita de la itala sekcio



Argentino.—La 6an de aŭgusto okazis oficiala inaŭguro de la strato *ESPERANTO* en la urbo *VENADO TUERTO*. En ĉeesto de la lokaj geesperantistoj kaj invititaj gvidantoj de lokaj kulturaj societoj, la Urbestro de Venado Tuerto, S-ro *ULISES GIACCAGLIA*, mem alfiksis la unuan tabulon. Supre ni vidas la Urbestran Moston kaj la ĉeestantaron post la ceremonio. Argentino jam havas, en la urbo General Alvear Mendoza, straton kiu nomiĝas "D-ro Zamenhof".

de Tutmonda Esperanto-Junular-Organizo sub la gvidado de S-ro *Giorgio Bronzetti*. La programo estis diversspeca kaj varia, kaj ĝiaj ĉefaj eroj okazis en la Urba Teatro. La laborkunsidoj donis al TEJO novan statuton kaj novan estraron, por ebligi pli fruktodonan laboron; la nova prezidanto estas S-ro *Heinrich Reiter* (Aŭstrujo). Pliriĉigis la programon la kunlaboro de kelkaj neplujunaj gesamideanoj ĉeestantaj, kiuj regalis la kongresanojn per interesaj paroladoj: S-ro *Setälä* pri finnaj poemoj, D-ro *Megalli* pri nuntempa Egiptujo, S-ro *Sekelj* pri siaj esplorvojaĝoj en Sudameriko, S-ino *Haudebine* pri la rektmetoda instruo de Esperanto.

La vesperaj aranĝoj, parte dediĉitaj al teatro, ankaŭ kun la partopreno de diversnaciaj grupoj, parte al la kulturo kaj parte al amuzo, vekis la intereson de la kongresanoj; kaj longe restos

en ilia memoro la kvar ekskursoj, al la Nacia Parko de Abruco, al la Adriatika marbordo, al Gran Sasso, al Romo. Specialan mencion meritas la konkursoj, kiuj unuafoje okazis en la kadro de IJK, kaj kiuj ampleksis teatraĵojn, paroladojn, folkloron, afiŝskizon kaj sporton; al ĉi tiu lasta donis sian oficialan kontribuon la Itala Federacio por Atletaj Sportoj.

Partoprenis proksimume 250 gesamideanoj el 13 landoj.

Jugoslavio

La grupo en *Pula*, sub gvidado de S-ro *St. V. Stojniĉ*, okazigis trimonatan ekspozicion. Oni prezentis 892 librojn (301 diversajn verkojn), 46 diversajn esp.-revuojn, 63 flugfoliojn kaj reklamojn, 425 il. pk. kaj kovertojn, 59 turismajn reklamojn kaj prospektojn, 35 fotografaĵojn, geografian karton de Jugoslavio, kiu

montris la organizadon de la enlanda movado, gazetteltranĉaĵojn, memorlibrojn, ktp. La ekspozicion vizitis ĉirkaŭ 700 personoj, inter ili la plej gravaj politikaj kaj urbaj kompetentuloj. Ĉe la unua ekrigardo multaj personoj—kiuj komprenas, kio estas literaturo—ekkriis: Ĉu eble, ke Esperanto havas tiel grandan literaturon?

La ekspozicion ebligis ĉefe Eldona Sekcio de Slovenia Esp.-Ligo, kiu sendis pli ol 600 librojn, kaj Kroatia Esperanto-Servo, kiu sendis pli ol 150. 90 personoj donis mondonacon en la sumo de 5,297 din., kaj 56 personoj skribis en memorlibron tre favorajn opiniojn pri la ekspozicio.

Kanariaj Insuloj

Post kelktaga anoncado en la gazetaro kaj radio, okazis la 26an de aŭgusto, sub aŭspicio de *Hispana Universitata Sindikato (SEU)*, kunveno por la kreo de *Grand-Kanaria Esperanto-Grupo*. Parolis S-ro *Germán Luzardo* (Provinca Ĉefo de SEU), S-ro *Oscar Yáñez*, kaj la Delegito de UEA S-ro *Báez*. Pro iniciato de la Vicdelegito, S-ro *J. Parada*, en apuda salono la ĵus-bakita sed tamen fervora kaj aktiva Estraro aranĝis ekspozicion. Oni ne devas silenti pri la afableco de SEU, kiu disponigis ĉion necesan (salonojn por kurso, ekspoziciejon, telefonon, ktp.), nek pri la klopodoj de la juna studento S-ro *Oscar Yáñez Miranda*. Sekvantan lundon komenciĝis kurso, kiun ĉeestas ĉ. 30 lernantoj, kaj oni preparas alian kurson en *Puerto de La Luz*.

Ĉar oni intencas prepari bonan ekspozicion venontjare, la Grupo jam nun akceptas interŝanĝon de esperantaĵoj kaj ĝoje ricevos salutajn aŭ gratulajn poŝtkartojn kompensotajn. Adreso: *Grand-Kanaria Esperanto-Grupo, S.E.U.*; Postkesto num. 330, Las Palmas de Gran Canaria.

Pollando

La promesita eldono de *Sinjoro Tadeo* en traduko de *Grabowsky* (vd. *Esperanto*, 1955, p. 185) aperos antaŭ la fino de la nuna jaro, kaj kostos proksimume \$1.50.

Svedujo

Por fariĝi doktoro ĉe la Universitato de Gotenburgo, S-ano *Ebbe Vilborg* studis la interrilatojn de grekaj manuskriptoj enhavantaj romanon "Leucipe kaj Klitofono" de la 2a jarcento p.K., kaj publikigis la tekston de la romano kune kun notoj pri la diversaj tekstvariantoj. Al la enkonduko, verkita angle laŭ la statuto de la universitato, li aldonis resumon en Esperanto. Verŝajne tio estas la unua fojo, ke filologia disertacio enhavas esperantan resumon, almenaŭ en Svedujo.

Esperanto-Postkongreso 1955 en Stuttgart

7an ĝis 11an de aŭgusto

La Postkongreson partoprenis 64 gesamideanoj. S-anino *Julia Isbrucker* kaj S-ano *Andreo Cseh* alvenis la 7an de aŭgusto, kaj partoprenis preskaŭ ĉiujn postkongresajn aranĝojn. La prelegoj de niaj nederlandaj gastoj estis bonegaj, kaj ni ne scias, kiel



esprimi nian elkoran dankon al ili ! Ni sukcesis aranĝi intervjuon inter S-anino Isbrucker, S-ano Cseh, S-ano *Loĉiĉnik* kaj la radio-raportisto S-ro *Kofron*, kiu okazis lundon fru-matene kaj dissendiĝis samtage.

La Postkongreso komenciĝis per Kristana Esperanto-Soleno, kiun aranĝis la KELI-Sekcio Stuttgart. Ĝi okazis en apud-salono de la Markus-Pregejo. Mallonge, la ĉefaj aliaj kongres-aranĝoj estis jenaj :

Lundon. Belega veturo tra arbaro gvidis nin al la *Kastelo Solitude*. Neforgesebla por eksterurbanoj certe estis la rigardo de tiu belega kastelo ĝis la eĉ malproksima ĉirkaŭaĵo. *Mardon.* Rondvojaĝo tra la Nigra Arbaro. *Merkredon.* Ni ĝuis viziton al la Landa Ekspozicio, kiu estis tiel ampleksa, ke tuta tago ne sufiĉis por rigardi ĉion. Vespere okazis Amuza Vespere. Inter alie, nia jugoslava gasto S-ano *Vane Loĉiĉnik* (solo-dancisto ĉe la *Opera Sarajevo*) prezentis al ni flaman popoldancon el sia hejmlando. *Ĵaŭdon.* Libera tago. Kelkaj vizitis la aŭtomobil-historian muzeon de la firmao *Daimler-Benz* ; okaze de la Postkongreso tiu firmao eldonis 1,000 esperant-lingvajn tekst-alдонаĵojn al sia ilustrita katalogo.

Laŭ niaj financaj cirkonstancoj ni faris la plej eblan, kaj ni supozas, ke la partoprenintoj estas kontentaj.

Maria Vogel

La 28a Kongreso de SAT

Linz/Danubo, 6-12 Aŭgusto, 1955

En tiu ĉi Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda partoprenis efektive 615 personoj el 16 landoj (inter ili Brazilo kaj Nord-Afriko). Enskribiĝis 670 el 19 landoj.

En la Malferma Soleno, dimanĉe la 7-an, elstaris la alparoloj de la prezidanto de SAT, L. Bannier, kaj de la ĉefurbestro de Vieno, F. Jonas.

La Kongreso solvis en tri laborkunsidoj, en harmonia atmosfero, la diversajn problemojn, kiujn naskis la nuntempa situacio.

En la venontjara Kongreso, kiu okazos de 24-31 julio 1956 en la ĉefurbo de Jugoslavio, Beogrado, la kongresanaro esperas renkonti membrojn el orientaj ŝtatoj, por la unua fojo depost la politika disigo postmilita.

Kvin prelegoj de la Laborista Universitato trovis atentan aŭskultantaron ; inter ili S-ro Steiner pledis varme por sia kreaĵo, la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, kies historion li skizis.

Multnombraj estis la fakaj kaj frakciaj kunsidoj ĉe tiu ĉi Kongreso ; tre menciindaj laŭnombro tiuj de la Naturamikoj (TANEF) kaj de la Sindikatanoj.

Bone aranĝita ekspozicio logis multajn neesperantistojn al vizito ; cetere la lokaj gazetoj anoncis pri ĝi. Tre instiga artikolo pri la Kongreso aperis en *Tagblatt* (social-demokrata organo de Linz). La publiko povis partopreni ankaŭ en la Kultura Vespere (dimanĉa), en kiu la urba orkestro prezentis la belegajn melodiojn de aŭstraj operet-komponistoj.

Ĉe la Adiaŭa Vespere (vendrede, la 12-an) plaĉis plej multe la folkloraj dancoj de geknaboj kaj plenaĝuloj pro sia verve kaj lerteco.

La Dua Geknaba Kongreseto unuigis por ludo, vizitoj, kaj promenoj 45 geinfanojn, inter ili grupo da 12 knabinoj el Birminghamo kaj da knaboj el apudpariza urbeto, kiuj demonstris konvinke, ke per Esperanto oni pli facile proksimiĝas ol per la provita eksperimento dulingvisma (angla-franca).

La duontaga ekskurso sur la Danubo, ŝipe, suferis iom pro pluva vetero, kvankam ĉi lasta ne povis venki super la bona humoro de la kunveturantoj. En sia tuttaga ekskurso (ĵaŭde) la kongresanoj ne nur ĝuis la belegajn de la naturo (Salzkammergut), sed ankaŭ povis fari sukcesan propagandan laboron : ja okazis akcepto ĉe la urbestroj de Gmunden (Traunlago) kaj Lenzing.

La kongresanoj konservis belajn memorojn pri tiu Linza Kongreso ; kaj ili ŝuldas apartan dankon al la fervora kaj sindona Organiza Komitato, kiu faris ĉion por agrabligi la restadon kaj sukcesigi la diversajn aranĝojn.

Donacoj al A.P.O.*

	£	ŝ.	p.
S-ro F. W. Vedder (Usono)	1	15	3
F-ino M. Boulton (Britujo)		7	6
F-ino M. Boulton (Britujo)		4	3
ĝis 31.VIII.1955	£2	7	0

* *Agado en la Proksima Oriento (vidu p. 213 de Jul./Aŭg. n-ro, 1954).*

La Internacia

Labor-Organizaĵo

Laboristoj, labordonantoj kaj registaroj kune prenas la decidojn kaj formas la politikon de la *Internacia Labor-Organizaĵo*, specialigita institucio ligita kun la *Unuiĝintaj Nacioj*.

La ILO estas la institucio kiu ellaboras internaciajn solvojn de urĝaj problemoj pri laboro kaj laboristoj.

Ĝia celo estas helpi por starigo de paco sur solida bazo de socia justeco. Ĝia devizo estas : “*Malriĉeco ie ajn estas danĝero al prospereco ĉie*”.

La ILO akceptas internaciajn laborajn kaj sociajn normojn. Ĝi ankaŭ donas teknikan helpon al registaroj, precipe en la ekonomie malpli evoluintaj regionoj de Afriko, Azio, Latina Ameriko kaj la Proksima kaj Meza Oriento.

Ĝis nun ĝi sendis ĉirkaŭ 400 ekspertojn, elektitajn el pli ol 35 landoj, al postenoj en ĉirkaŭ 40 ŝtatemembroj. Ĝi aljuĝis stipendiojn al eĉ pli granda nombro de oficistoj kaj laboristoj-studentoj en la landoj kiuj ricevas helpon. Pli ol duono de tiu klopodo estis sur la kampo de teknika edukado, edukado interne de industrio kaj produktado.

Fondita en 1919

La ILO estas la sola postvivanto de la interregistaraj institucioj starigitaj post la unua mondmilito. Ĝia Konferenco akceptis pli ol 100 Internaciajn Labor-Konvenciojn (traktatojn) post ĝia fondiĝo en la jaro 1919. Tiuj konvencioj ne fariĝas devigaj por ŝtato, ĝis ties parlamento aŭ ratifpovanta aŭtoritato aprobas ilin.

Konferencoj kaj kunvenoj de ILO kunvenigas ne nur la delegitojn de registaroj sed ankaŭ la reprezentantojn de labordonantoj kaj laboristoj kiuj voĉdonas sendepende de registaraj instrukcioj laŭ la deziroj de la organizaĵoj de laboristoj kaj labordonantoj en siaj respektivaj landoj.

Estas ĉi-tiu “triparta” strukturo kiu donas al ILO ĝian ekvilibron kaj multon el ĝia forto kaj kiu malsimiligas ĝin de la aliaj specialigitaj institucioj kiuj grupiĝis ĉirkaŭ UNO. La intereso de la sindikatoj kaj de la federacioj de labordonantoj helpis al ILO postvivi la diversajn ondegojn de ekonomia depremiĝo, faŝismo kaj milito inter la jaroj 1919 kaj 1939.

La Laboro de la ILO

La Internacia Labor-Organizaĵo havas multajn aliajn taskojn krom tiuj supre priskribitaj.

Ĝi komisias enketogrupojn por esplori akuzojn pri subnormaj kondiĉoj kaj por alporti amikan spertan konsilon, kiel plibonigi tiajn kondiĉojn.

Ĝi havas konstantajn suboficejojn, surlokajn senditarojn kaj korespondantojn tra la mondo por helpi registarojn, neregistarajn organizaĵojn kaj individuojn pri aferoj en sia sfero.

Je ĝia ĉefsidejo en Ĝenevo okazas tutjara esplorado sur kiu estas bazata ĝiaj multnombraj socialaj studoj, ekonomiaj raportoj, statistikoj kaj periodaj eldonaĵoj.

Ĝiaj ekspert-komitatoj kaj industria komisionoj kontribuas al pligranda sendanĝereco, plibona sano, pliigita produkto kaj plialtaj normoj de bonfarto kaj interrilatoj en agrikulturo kaj industrio.

Tiaj organoj kaj la “*ad hoc*” (por unu afero) Komitato pri Deviga Laboro, starigita komune de la Unuiĝintaj Nacioj kaj de ILO, konstatas la faktojn por helpi pri elradikado de sociaj malbonoj kiuj minacas la liberecon de asociado kaj la individuajn liberecojn de laboristoj.

Kvindek nacioj estas reprezentataj inter la pli ol 700 oficistoj gvidataj de la Ĝenerala Direktoro, David A. Morse, el kiuj konsistas la profesia oficistaro de la Internacia Labor-Oficejo kaj ties suboficejoj kaj senditaroj.

Ili plenumas la laboron de la ILO pri maristoj, indiĝenaj laboristoj, laboristoj en nesinregantaj teritorioj kaj multaj aliaj. Ili provizas la sekretarion por konferencoj kaj kunvenoj de ILO en ĉiuj partoj de la mondo.

Tutmonda Kodo pri Laboro

Ĝis la nuna tempo la ŝtat-membroj deponis pli ol 1,500 ratifilojn de konvencioj en la ĉefsidejo de ILO en Ĝenevo. Kelkaj el la konvencioj postulas :—

- sindikatan liberecon
- okhoran labortagon
- protektadon de salajroj
- pagatan libertempon

kelkaj el ili malpermesas :—

- noktan laboron de virinoj kaj infanoj
- laboron de virinoj en minejoj
- devigan laboron kaj ŝuldlaboron (peonage)

Ŝtat-membroj, ĉu ili ratifas la konvenciojn aŭ ne, devas ekzameni ilin kaj konsideri ĉu ili povas ilin ratifi. Ili devas raporti de tempo al tempo al la ILO rilate al la stato de sia leĝaro kaj de praktiko. Tiamaniere la konvencioj de ILO influas normojn eĉ en ŝtatoj kie ili ne estas ratifitaj.

ILO montras la vojon ; ĝi ne ordonas.

ILO konferencoj ankaŭ akceptis 100 oficialajn rekomendojn al registaroj. Tiuj rekomendoj ne postulas ratifon. Ili, kune kun la konvencioj, helpas kompletigon de la aro de tutmondaj labornormoj nomata la Internacia Laborkodo.

Tiu Kodo de konvencioj kaj rekomendoj pritraktas vastan amplekson de temoj inter kiuj :—

- senlaboreco
- medicina zorgado
- sociala sekureco
- migrado
- laborborsoj
- semajna ripozo
- protektado pri akuŝo
- organizado pri dungado
- servoj pri inspektado de laborejoj
- laborkondiĉoj de maristoj
- klaŭzoj pri laboro en publikaj kontraktoj
- minimuma aĝo por allaso al laboro
- kuracistaj ekzamenoj por dungado
- laboro de virinoj en malsanigaj okupoj
- kompenso pro laborakcidentoj
- la rajto organiziĝi
- la rajto fari kolektivajn kontraktojn

La Komitatoj de I.L.O.


Depost 1945 ok industriaj komisionoj estas starigitaj por helpi pri solvado de la apartaj sociaj kaj ekonomiaj problemoj kiuj troviĝas en apartaj industrioj. Ĉeestas la kunvenojn po du reprezentantoj de la laboristoj, labordonantoj kaj registaroj de la ŝtatoj reprezentataj ĉe ĉiu komisiono.

Tiuj komisionoj estas nun organizitaj por karbominado, teksaĵoj, konstruado, fero kaj ŝtalo, mekanika fabrikado, enlanda transportado, produktado kaj rafinado de petrolo kaj kemiaĵoj.

Plue, estas multaj komisionoj kaj komitatoj por progresigi la laboron de la Organizaĵo sur difinitaj kampoj. Inter ili estas :—

- Komuna Mara Komisiono
- Konstanta Komisiono pri Agrikulturo
- Komitato pri Okupa Sekureco kaj Saneco
- Komitato pri Virina Laboro
- Konstanta Komitato pri Migrado
- Komitato de Ekspertoj pri Sociala Sekureco
- Konsila Komitato pri Profesiaj kaj Salajritaj Laboristoj
- Komitato pri Laboro en Plantejoj
- Enketa kaj Akordiga Komisiono pri Libereco de Asociado

Strukturo de la I.L.O.



La Deklaracio de Philadelphia

La konstitucio de la Internacia Labor-Organizaĵo deklaras ke “universala kaj daŭra paco povas esti starigata nur surbaze de socia justeco.”

Dum la milito, en la jaro 1944, la Internacia Laborkonferenco, kunveninta en Philadelphia (Filadelfia) reasertis la dediĉon de la ILO al paco.

La laboristoj, labordonantoj kaj registaraj reprezentantoj de la ŝtato-membroj akceptis deklaron kiu diris, ke

- *La laboro ne estas komercaĵo*
- *Malriĉeco ie ajn estas danĝero al prospereco ĉie*
- *Libereco de diskutado kaj de asociado estas esencaj por daŭra progreso.*

La “Deklaracio de Philadelphia” diras ke estas solena devo de ILO progresigi inter la ŝtatoj programojn formulitajn por atingi serion de socialaj celoj inter kiuj :—

- *plena okupeco kaj salajro sufiĉa por deca vivo*
- *pliigo de sociala sekureco kaj de medicina zorgado*
- *sufiĉa nutrado, adekvata loĝejo kaj libera tempo*
- *la rajto fari kolektivajn kontraktojn*
- *egalaj eblecoj por ĉiuj, atingi altan gradon de klereco kaj de profesia sperteco*
- *sufiĉaj aranĝoj pri sano kaj sekureco*

Ĉiu ŝtato kaj ĉiu grupo reprezentita ĉe la konferenco konsentis pri tiuj principoj.

Sed por efiki, ili devas esti komprenataj. Fine, la laboro de ILO dependas de inteligenta kaj informita publika opinio.

Enkonduko al la Konstitucio de la I.L.O.

Konsiderante ke universala kaj daŭra paco povas esti starigata nur surbaze de socia justeco ;

Kaj konsiderante ke ekzistas laborkondiĉoj trudantaj al granda nombro da homoj tian maljustecon, mizeron kaj mankojn, ke universala paco kaj konkordo estas minacataj pro la grandega malkontenteco kiu rezultas ; kaj ne urĝas plibonigi tiujn kondiĉojn per diversaj metodoj, ekzemple : per reguligo de laborhoroj kaj inkluziva starigo de maksimuma daŭro de labortago kaj laborsemajno, per reguligo de laborhavigo, antaŭforigo de senlaboreco, provizo de salajro donanta sufiĉan vivnivelon, per protekto de laboristoj kontraŭ malsano kaj laborhora akcidento, per protekto de la infanoj, gejunuloj kaj virinoj, provizo por maljuneco kaj difektoj, per defendo de la interesoj de laboristoj kiam okupataj eksterlande, per rekono de la principo pri egala laborpago je egalvalora laboro, rekono de la principo pri libereco je asociado, per organizo de profesia kaj teknika edukado kaj aliaj aranĝoj ;

Konsiderante ankaŭ ke se iu ajn nacio malakceptas reĝimon certiganta homajn laborkondiĉojn, tio kontraŭstaras la klopodojn de la ceteraj nacioj kiuj celas plibonigi la sorton de la laboristoj en sia propra lando ;

La Altaj Kontraktantoj, inspiritaj de sentoj de justeco kaj homeco, samkiel de la deziro certigi daŭran mondpacon, kaj por atingi la celojn difinitajn en ĉi tiu Enkonduko, interkonsentas pri la Konstitucio de la Internacia Labor-Organizo.

La 70 [^]Stat-Membroj de I.L.O.

Afganistano	Egiptujo	Italujo	Peruo
Albanujo	Ekvatoro	Izraelo	Polujo
Argentino	Etiopio		Portugalujo
Aŭstralio		Japanujo	
Aŭstrujo	Filipina Respubliko	Jugoslavio	Salvadoro
	Finnlando		Sirio
Belgujo	Francujo	Kanado	Sud-Afriko
		Kolombio	Svedujo
Bielorusujo	Germanujo	Kostariko	Svislando
Birmo	(Federacia	Kubo	
Bolivio	Respubliko)		Tajlando
Brazilo	Grekujo	Libano	Turkujo
Britujo	Gvatemalo	Liberio	
Bulgarujo		Libio	Ukrajno
	Haitio	Luksemburgo	Unuiĝo de
Cejlono	Hindujo		l'Socialistaj
Ĉilio	Honduraso	Meksikio	Sovetaj
Ĉinujo	Hungarujo		Respublikoj
Ĉekoslovakujo	Indonezio	Nederlando	
	Irano	Norvegujo	Urugvajo
Danujo	Irako	Nov-Zelando	Usono
Dominika	Irlando	Pakistano	Venezuelo
Respubliko	Islando	Panamo	Vietnamo

I.L.O. Informado

Informaĵo kaj priskribaĵoj pri ILO, katalogoj de lastatempaj eldonaĵoj kaj abonoj al kaj specimenoj de gazetoj estas haveblaj per letero al la Internacia Labor-Organizaĵo ĉe iu ajn el jenaj adresoj :—

Genève, Svislando

95 Rideau St., Ottawa, Ontario, Kanado

917 15th St., N.W., Washington 5, D.C., Usono

38-39 Parliament St., London S.W.1, Britujo

3 Jantarmanthar Road, Cochin House, New Delhi, Hindujo

I.L.O. Surlokaĵoj kaj Komisiitaroj :—

P.O. Box 4, Bangalore, Mysore State, Hindujo

28 Racecourse Road, Lahore, Pakistano

Istambul Universitesi, İktisat Fakültesi, İctimaiyat Enstitüsü İstanbul, Turkujo

Edificio "América" "B" 10° Piso, Av. Juárez No. 42, México, D.F., Mexico

Avenida Arequipa 173, Lima, Peru

(Oficiala eldono de la Internacia Labor-Organizaĵo)

Raporto pri la Belarta Konkurso 1955

A. Nombro de la konkursaĵoj

Originala Poezio

26 aŭtoroj 52 konkursaĵoj

Tradukita Poezio

16 tradukistoj 31 konkursaĵoj

Originala Prozo

10 aŭtoroj 12 konkursaĵoj

Originala Drameto

4 aŭtoroj 4 konkursaĵoj

Sume :

56 aŭtoroj 99 konkursaĵoj

B. Nacia statistiko

Brazilo 2, Meksikio 1, Ĉeĥoslovakio 2, Jugoslavio 3, Bulgarujo 1, Irlando 1, Italujo 4, Svedlando 2, Anglujo 7, Francujo 1, Aŭstrujo 1, Germanujo 2, Belgujo 1, Danujo 1, Hispanujo 1, Nederlando 1, Norvegujo 2, Skotlando 2. Entute 18 landoj kun 35 verkintoj. (Kelkaj konkursis en pluraj branĉoj ; kompreneble ilin ni kalkulas nur po unu fojo.)

Laŭ la premioj (I-III-a premioj) kvinfoje la komisiono distingis anglan konkursanton, dufoje ĉeĥoslovakon kaj norvegan, unufoje italan kaj belgan konkursanton. (Premiitoj iĝis reprezentantoj de kvin nacioj.)

Originala Poezio

1. F-ino Marjorie Boulton, Stoke-on-Trent, Anglujo (*Alvoko al amo*)

2. S-ro Jiří Kořinek, Brno, Ĉeĥoslovakio (*Komenco kaj fino*)

3/4. Claude Piron, Namur, Belgujo (*La soldato, kiu marŝas, Havena nokto*)

Jusnomito ricevas ankaŭ honoran mencion pro la verko *Havena nokto*.

Kun laŭdo mencias la komisiono la verkojn de S-ro Reto Rossetti, Birmingham, Anglujo (*Mestizo de la*

mondo), S-ino Clelia Conterno Guglielminetti, Torino (*Marito, 1945*), S-ro Poul Thorsen, Kopenhago (*Mi metos kandelon kaj Fekundo*).

Tradukita Poezio

1. S-ro Jiří Kořinek, Brno, Ĉeĥoslovakio (Neruda : *Balado pri la polko*)

2. S-ro Enrico Dondi, Roma (Dante : *Manfredi*)

3. Pastro Hans Amund Rosbach, Hasvik, Norvegujo (*Transdonu de la koro la zorgon*)

Kun laŭdo menciataj : S-roj Lucien Thèvenin, St. Etienne, Francujo (*Hirundo kaj kaptito*), kaj John Francis, Glasgow, Skotlando (*Childe Harold*).

Originala Prozo

1. S-ro Johan Hammond Rosbach, Sarpsborg, Norvegujo (*Lajunulino, la ĉapelo kaj mi*)

2. F-ino Marjorie Boulton, Stoke-on-Trent, Anglujo (*Justeco*)

3/4. S-roj R. J. French, Bexley, Anglujo (*La kvara*) kaj J. D. Applebaum, Sheffield, Anglujo (*Ichok, la bovido*).

La komisiono estis devigita unu konkursaĵon ne akcepti pro troa longo.

Originala Drameto

La sola (unua) premio apartenas al F-ino Marjorie Boulton, Stoke-on-Trent, Anglujo, pro la verko *Ĉe l' akvo de forgeso*.

Boras, la 24-an de julio, 1955.

D-ro F. Szilágyi

Sekretario

Belarta Konkurso 1955

Tradukita Poezio : Unua premio



Jan Neruda

Balado pri la Polko

Plac' vilaĝa svarmas gaje ! Polko sidas en or-sledo,
 nigra ĉevalpar' antaŭe en rubanda tualetto,
 super ili printempece kantoj mil en ĝoj' jubilas
 kaj vilaĝa junularo ĉirkaŭ ili saltas, giras.
 Polko en la ora sledo volas ja ĝis fora urbo—
 "Do vojaĝu, kara polko, kun feliĉ' kaj sen perturbo !
 Kio venis el vilaĝo, en fiera urb' mirante,
 oni ŝovos piedetojn koks-apoge, gajos kante !"
 Polko venas—polko venas.

Vipon laŭte ŝi knaligas—kia voj' glitveturila !
 Sub la sledo neĝo kantas, sur la arbo merlo trilas,
 ekplezure ŝton' ruliĝas, ja eĉ monto danci provas,
 rokan pugnon koks-apogas kaj laŭ takto kapon movas.
 Pri la polko vana zorgo ! Ŝi ja estas sen konkuroj,
 al ŝi vangoj roze floras, steloj brulas en okuloj,
 pro l' gajec' en juna korpo vibras ĉiu kapilaro,
 ŝi eterne emas kanti, giri salte en la balo.
 Polko venas—polko venas.

Urban tarde algalopis la ĉevaloj ŝaŭme ŝvitaj,—
 ej, malgajas urb' vespere, pordoj vintre fermŝlositaj,
 placo kvazaŭ post balao, stratoj surde dezertegas,
 super domoj dens' nebula, sub tegmentoj nokto regas.
 Polko sur la teron saltis, viŝas neĝon el vizaĝo,—
 "Kiu gaston akceptemas, ĉu sen hom' la ĉirkaŭaĵo ?"
 Ŝi al domoj rondrigardas kaj alfrapas fenestreton,
 de interne voĉo krudas : "Kiu ĝenas nokt-kvieton ?"
 "Polko venas—polko venas.—"

“Jen, edzino, polko venas ! Estu nia gast' bonvena,
 espereble vi ĉi domon plaĉa trovos kaj konvena !
 Tuj vi estos kiel hejme : juna ino, juna viro,
 sur plafono violonoj, sub tegmento sakfajfilo,
 muroj plenas de klarnetoj, kontrabaso en angulo,
 pordo knaras laŭ la notoj kaj fagotas fornobrulo.
 Hastu tra la urb', edzino, kaj invitu junajn, oldajn
 kuninvitu riĉajn, povrajn, semu vortojn ĝojheroldajn :
 Polko venas—polko venas !”

Tuta urb' al polko venis ! Malriĉul' “Bonvenon” diris,
 la riĉul' nudigis kapon, reĝ' de kap' eĉ kronon tiris.
 Kiam polko ekturĉigis, reĝo kaptis la reĝinon,
 princ' principinon, Joĉjo Kanjon, Toĉjo ĉe tali' Marinjon.
 Hej, la kirlo, la ĝojkrio ! Miloĵ da okuloj lumas—
 jen, ĉu vero aŭ miraĝo—eĉ la ĉambro dance zumas,
 mur' sin turnas kun la muro, forno ritme sin balancas,
 seĝoj, benkoj leviĝetas, en plafono traboj dancas—
 Polko venas—polko venas !

El la ĉeĥa tradukis

Jiří Korišek



Belarta Konkurso 1955

Originala Prozo : Unua Premio

La Ĵunulino, la Ĉapelo kaj Mi

*Dediĉita al S-ro L. Friis kaj la
 Internaciaj Someraj Kursoj en
 Helsingör.*

TRE oportune nia arbo staris, kvazaŭ markante limon inter la trotuaro kaj la lerneja placo. Ekzistis neniu barilo, sed ni respektis la limon. Preskaŭ ĉiam ni respektis ĝin. Preterpasis homoj, ni salutis konatojn, kelkaj haltigis sian rapidon por paroli minuton kun iu inter ni. Krome tiu arbo tiel staris, ke la inspektanta lektoro ne povis tuj atenti pri kaŝstudoj de la tasko por la venonta leciono. Kaj ĉe tiu oportuna arbo estis la restejo de mia klaso inter la lecionoj.

Ofte mi tie tradukis el “*Le Petit Chose*” por miaj kamaradoj, kiuj tute ne interesiĝis pri studoj de la franca lingvo. Tio igis min eĉ pli diligente studi la francan hejme, ĉar mi tre ŝatis imponi la aliajn per flua tradukado kaj gramatikaj klarigoj. Kelkfoje ankaŭ la knabinoj ariĝis ĉe la arbo,—ili

cetere ĉiam fraŭline promenis—kaj mi fiere kontentiĝis, kiam mi spertis, ke ili ĉiam alvenas, kiam mi rolas kiel interpretanto.

Des pli diligente mi ĉiuvespere studis francan gramatikon kaj parkeris francajn vortojn.

Ja ne pro intereso pri mia persono la junaj fraŭlinoj ariĝis ĉe nia arbo, kaj ĉarmaj ridetoj, kiuj ĉiam estis la rekompenco, ne esprimis admiron, nur miron—miron, ke iu vere studas la francan hejme, kaj dankon, veran dankon pro utila helpo en la ĝusta momento.

Sed mia koro varmiĝis.

Mi kuraĝis rigardi tiujn junajn knabinojn per okuloj, kiuj montris nenian intereson: aliajn, pli altajn interesojn mi havas. Pri virinoj mi parolis per vortoj, kiuj devus supozigi aliajn—plialtajn—interesojn, ankaŭ en tiu rilato.

Dume mia koro suferis.

Ĉar mi ne kuraĝis—mi vere ne kuraĝis libere paroli al knabino. Mi sekrete sopiris al tiuj ĉarmaj kamaradinoj, esperis vane pri kareso aŭ eĉ aminduma vorto. Mem mi ne kuraĝis karesi—eĉ ne ŝerce amindumi. Mi enviis miajn kamaradojn, kiuj senpere ŝercis kun ili, tuŝis ilin, vespere promenis kun ili, ŝtelis kisojn de ili. Brulis dolore en mia koro pro manko de dolĉa brulo de molaj lipoj.

Mi ŝajnis fieran mankon de intereso.

Sed al miaj samklasanoj mi kvazaŭ hazarde per ŝajne nepripensita vorto supozigis ian heroon. Iel mi ankaŭ sukcesis doni la impreson, ke mi posedas iun virinon. Sed mi ne fanfarone disheroldis, kiel la aliaj, pri miaj konkeroj. Mi silentis.

Tamen iun ventegan tagon mi decidis doni impreson pri venko. Mi rapide kunmetis mensogon pri aventuro. Mi rakontis, ke mi survoje al la lernejo ekvidis nekonatan junulinon, kiu venas kontraŭ mi. Subite la ventego kaptis ŝian ĉapelon kaj kirlis ĝin trans la straton, super domon,—for. Mi faris signon al la fraŭlino kaj rapidis por retrovi la ĉapelon. Tre rapide mi trovis ĝin apud rubujo, kaj alportis ĝin al la virino. Ŝi dankis, rapide ĉirkaŭbrakis min, kaj daŭrigis sian iradon.

Drama okazintaĵo. Sed la kamaradoj ne emis kredi mian historion. Mi miris kial, ĉar al mi la tuta historio ŝajnis tre ebla. Montriĝis tamen, ke ili ne volas kredi, ke la virino ĉirkaŭbrakis min. La ceteron ili kredis, sed ne la veran perlon!

Mi insistis pri la vero de mia mensogo, ĝis la kamaradoj fine petis min montri al ili tiun virinon. Tion mi tuj promesis fari.

Jen malfacila situacio. La urbo ne estis granda, preskaŭ ĉiuj konis unu la aliajn, kaj fremdulo estis tuj observata. La fakto, ke la serĉata fremdulo estas juna ĉarmulino, ne povis fari la situacion pli facila por mi. Sed mi ja mensogis por fanfaroni—kaj mi vere meritis la malfacilan problemon.

Mi decidis persisti. Mi havis kelkajn malagrablajn tagojn. Mi ne sufiĉe zorgis pri "*Le Petit Chose*". Suferis ankaŭ la studoj de la aliaj fakoj de la lernejo. Kiam ariĝis kiel kutime la gekamaradoj por aŭskulti mian tradukadon, ili unuafoje spertis, ke mi ne flue kaj elegante interpretas. Mi

diris, ke dum la lastaj vesperoj mi estis tre okupata, kaj ne havis sufiĉe da tempo por dediĉi al la lerneja laboro. La knabinoj rigardis min per scivolaj okuloj, kion mi vere ĝuis,—kaj la knaboj komencis miri, ĉu eble la ĉapela afero tamen evoluas . . .

Mia problemo tamen ne estis solvita. “*Où est la femme ?*” diris la kamaradoj, uzante la solan francan frazon, kiun ili sciis parkere. “*Où est la femme ?*”

Kion fari ? Mi devis trovi iun junulinon, kiu povus roli kiel mia ĉarma nekonatino ! Sed kie kaj kiel ?

Pasis semajno.

Iun vesperon mi faris viziton ĉe miaj geonkloj. Mia onklino akceptis min per eksterordinara afablo. Mi kutimis de tempo al tempo viziti ilin, ĉar ili ofte estis solaj, sed ĝuste tiun vesperon ili certe atendis gastojn, ĉar mia onklino portis belan robon.

“Venu, kara Johano,” ŝi diris, “ni invitis hodiaŭ vespere tri junajn homojn, kiujn vi certe ŝatos renkonti.”

Kaj ŝi kondukis min en la salonon, kie sidis unu juna sinjoro kaj du junaj knabinoj, krom mia onklo. Mia onklino sidigis min apud la pli bela knabino.

Mia koro komencis furiozi en mia brusto. Jen mia granda ŝanco !

Mia onklo per tre multaj vortoj detale klarigis, kiuj estas la tri nekonatoj, kial ili venis, de kie ili venis, kion ili volas fari en la urbo. Mi verŝajne ne estis tro atenta aŭskultanto. Mi febre pensis pri mia problemo. Tamen kaptis min tio, kion diris mia onklo pri la alveno de la gejunuloj. Ili ĵus alvenis ! Do preskaŭ neniu en la urbo ankoraŭ vidis ŝin ! Kaj mia onklo diris, ke ili restos unu semajnon—ili eĉ loĝos ĉe miaj geonkloj ! Ŝajne la sorto decidis ĉifoje favori min !

Mi pasigis vere agrablan vesperon. Mi gaje kaj libere parolis kun la junaj homoj, kiuj estis ĉiuj tre simpatiaj, kaj mia onklino miele ridetis, sciante, ke ŝi (kaj ŝia edzo) kaŭzas tiom da amuzo kaj agrablo por kvar junaj homoj.

Mi faris strategian planon. Mi pliproksimigis mian seĝon al la sofo, en kiu sidis mia viktimo, Loca. Mi elektis momenton, kiam la aliaj vigle interparolis—tiam mi komencis rakonti al ŝi tre amuzan historion, kvankam ŝi aŭskultis la konversacion de la aliaj. Sed ŝi ĝentile kaj bonkondute aŭskultis mian historion.

Jen la historio : Kamparano volis iri al la urbo por vendi kokidojn. Diris lia edzino, ke li samtempe aĉetu novan ĉapelon. Cetere estas pli bone, ke ŝi iros, ĉar ŝi ne forgesos ion, kaj ŝi multe pli bone atentos la monon. La edzo bonedukite jesis. Por scii la grandon de la aĉetota ĉapelo, la edzino mezuris la kapon de sia edzo per ŝnuro, kaj metis la ŝnuron en la monujon.—Sed ho ve ! La postan matenon la edzino havis fortan dento-doloron, kaj la kamparano devis mem iri al la urbo. Li vendis la kokidojn, kaj poste iris al la ĉapelisto. La ĉapelisto demandis, kion li deziras, kaj la kamparano diris, ke li deziras novan ĉapelon. La ĉapelisto komencis montri al la kamparano kelkajn ĉapelojn, sed subite tiu kuris for. La ĉapelisto demandis, ĉu li tamen ne volas aĉeti ĉapelon. Respondis la kamparano, ke

li perdis la ŝnuron, kiun la edzino metis en la monujon—kaj tiu ŝnuro estas la mezuro de lia kapo. Do li ne plu scias, kiel grandan ĉapelon li aĉetu !

La junulino ekridegis pro la historio, tiel ke la aliaj interrompis sian konversacion por scii, kio estas tiel amuza. Tion mi ne ŝatis, ĉar mi planis de unu ĉapela historio transiri al alia—al la mia. Kaj jen la scivolo de la aliaj detruis mian planon, ĉar mi devis ripeti la historion, tiel ke ĉiuj povu amuziĝi pri ĝi. La rezulto estis, ke oni komencis rakonti amuzajn historiojn.

Mia unika ŝanco estis for.

Kaj ĝi ne revenis. Mi provis kelkfoje ekparoli al la ĉarma junulino apud mi, sed estas stranga fakto, ke oni ial malpli facile parolas al bela knabino, ol al malpli bela . . .

Mi zumetis kanton, kiam mi iris hejmen tiun vesperon. Mi ja ne atingis mian celon, sed mi amikiĝis kun ĉarma knabino. Mi havis ŝancon iam promeni kun ŝi tra la stratoj—tiel ke ĉiuj vidos min ! Mi estis kontenta, malgraŭ ĉio. Kaj reveninte al mia ĉambro, mi fervore studis la aventuron de "*Le Petit Chose*" en la stratoj de Parizo.

Ĉe nia arbo mi tradukis la postan tagon kiel kutime—kaj denove mia traduko senhezite kaj elegante fluis. Sed nun ankaŭ la knabinoj de la klaso sciis pri la ĉapelo, kiun mi heroe savis, pro kio la juna posedantino ĉirkaŭbrakis min—

Sed ankaŭ la knabinoj rifuzis kredi. Laŭ ili la juna nekonatino ekzistas nur en mia fantazio ! Tio kaŭzis al mi fortan ĉagrenon, sed mi montris nenion. Mi afable faris mian tradukon—neniu lektoro povis vidi, ĉar la arbo staris en tre oportuna loko.

En tre oportuna loko staris la arbo. Jen unu el la knaboj atentigis al alia pri bela knabino, kiu proksimiĝas sur la trotuaro. Baldaŭ ĉies okuloj direktiĝis al la belulino—neniu plu interesiĝis pri Daniel antaŭ la teatraj afiŝoj.

Cetere mia tradukado subite ĉesis, kiam mi ekvidis, kiu estas la belulino. Estis Loca ! Ĉu tiel devos fiaski miaj planoj !

Baldaŭ ŝi estos ĉe nia arbo. Jen ŝi ekvidas min. Ŝi ridetas. Dolĉe. Mi salutas. Ŝi venas al la grupo. Ŝi prenas mian manon.

"Dankon pro agrabla vespero hieraŭ !"

Mi sentis, kiel mi kreskas. Miaj ŝultroj terure larĝigas.

Ĉies okuloj rigardis min. La heroon.

"Ĉu via klaso ?" Loca demandis. Mi jesis.

"Ni kaŝe studas la aventurojn de '*Le Petit Chose*'," mi klarigis.

"Kaj vi tradukas por la aliaj, ĉu ?"

"Jes—". Pro modesto mi silentis. Unu el la knabinoj komencis klarigi, ke me estas la spertulo en la klaso pri la franca. Mi ne ŝatis la situacion.

Sed la situacio fariĝis ankoraŭ malplaĉa, kiam la knabino tre dolĉe demandis : "Vi estas fremda en la urbo, ĉu ne ?"

Mi timis la respondon. Sed Loca nur respondis, ke ŝi ĵus alvenis.

". . . kaj tamen jam konas nian Johanon ?" La demando estis pli dolĉa ol sakarino.

"Jes, ni jam konas unu la alian. Fakte epizodo pri ĉapelo estis la komenco . . ."

Loca tre surpriziĝis pro la reago en ĉiuj vizaĝoj. La surprizon de Loca nur mi rimarkis.

Johan Hammond Rosbach

Belarta Konkurso 1955

Originala Poezio : Unua premio



Alvoko al Amo

(Ĉi tio estas la lasta parteto de longa poemo,
kiu bedaŭrinde ne estas publikigebla kiel tuto.)

*kaj la viktimoj de si mem, kun brilaj
radioj benu ilin ; benu ĉion
kio suferas ; brilu por ekzilaj*

*pecetoj de l'homaro ; portu scion
al ili, per la supernuba helo ;
lumigu nian homan tragedion !*

*Preter perfido, naŭzo kaj kruelo,
vi ja ekzistas ĉiam ; ĉar mi vidis.
Mi, dum momento . . . super
nub-nivelo . . .*

*Ruinigitaj homoj koincidis
nur per kompatato, eble per hazardo . . .
tamen, li amis ; lia am' validis.*

*Ho, amo, ŝirmu en sekreta gardo
la senesperajn ; ili vin perceptu,
almenaŭ malproksime, per rigardo.*

*Ke ili renaskiĝu kaj adeptu ;
aŭ, se la eblo ne ekzistas plu,
la faton ili konu kaj akceptu :*

*ĉar mi, neniam nun en ama Du
estonte la Duono, mi, ruino,
estas pli eta ol ĉiela blu'—*

*kaj mia propra tristo kaj destino
nenion pruvas, kiel en la fiŝa
mondo pereas frajo laŭ rutino—*

*Naturo estas malŝparema, riĉa ;
la lumo ĉiam brilos super ĉio
eĉ se mi mem restados malfeliĉa . . .*

*inter la nuboj, jen la lumostrio,
ĉiama lumo, ora kaj espera—
ho, Amo, nia vera iluzio,*

kiu kondukas nin al vero vera !

Marjorie Boulton

*Ho, Amo, vivkomenco, vivosumo !
Lumu por ni, per viaj gloroj mitaj,
sed, kiel ĉiuj mitoj, veraj ! Fumo*

*kaj nuboj kaŝas vin de ni, perditaj ;
sed brilu en la koroj, nin konsolu !
Trapiku la nubaron per zenitaj*

*radioj, vivmistero ! kaj parolu
al ĉiuj kiuj solas, sen esperoj ;
diru al ili firme, "Ne plu solu."*

*Venu al la perditaj de la tero,
kaj montru la ĉielon sen makulo,
per lumo el pli pura atmosfero !*

*Venu al sinturmenta, pala ulo,
eŭnuko de la cirkonstancoj ; venu
al nervmalsanulino sur insulo*

*dezerta inter homoj ; kaj serenu
por iu toleranta edzan ligon
netolereblan ! Vidu, brilu, benu !*

*Alportu vivocelon, liberigon,
al ĉiuj kiuj sur malĝustaj vojoj
penadas venki strangan korp-instigon*

*perversan ; kiuj kuras antaŭ bojoj
de nigraj hundoj ; en profundaj histoj
portas la malebligon de l'amĝojoj ;*

*brulu por la putinoj, la sadistoj,
fraŭlinoj kun infanoj, kaj sterilaj
edzinoj ; viktimoj de l'faŝistoj*

Intervjuo



Poul Thorsen, kulturita dano,
kulturas Rozojn kaj Urtikojn,
laŭ *gruk'*, *soneto*, *filigrano*
k.t.p., verkas la lirikojn,
kaj eĉ klopodas (ho, nirvano !)
produkti taŭgajn *limerikojn* . . .
Ĉi brava bub' ne estas nano,
vikinge velas amerikojn !

Nia redakcio faris al S-ro Thorsen jenajn demandojn :—

Via Poemaro, Rozoj kaj Urtikoj, havis bonan akcepton ĉe la recenzantoj. Kiuj poemoj donis al vi plej multe da plezuro ĉe la plenumiĝo ?

Efektivan plezuron en la signifo, ke la finrezulto ŝajnis relative kontentiga, donis el la tradukoj : *Frua disiĝo* de Aarestrup, *la eskimaj kantoj* kaj *Leprulo* de Seedorff. Inter la originaloj eble nomindas : *Fenestroj*, *Al Josephine Baker* kaj *Frua mateno en Sarajevo*, sed ne forgesu, ke ekzistas aliaj floroj ol la rozoj kaj urtikoj, supozeble tial ankaŭ aliaj “plezuroj”. Laste mi aŭdis (ne sen kortuŝeto), el fidinda buŝo, ke almenaŭ unu persono ĉiunokte legas minimume unu poemon mian antaŭ ekdormo. Ke mia potenco sufiĉu !

Vi verkas, krom poemoj, ankaŭ novelojn. Sur kiu el la du kampoj vi planas vian pluan verkadon ?

Iam mi provis fari kelkajn novelojn, ĉefe aŭtobiografiajn. Tio okazis, mi kredas, kvazaŭ por liberigi min de pli frua vivado. Poste mi ne plu sentas tiel forte la nepron komuniki min proze. En tirkestoj kaj fantazio verdire nestas pli malpli pretaj projektoj, sed fakte la miniatura arto, la poemeto en severe fiksita formo, multe pli min altiras, foje obsedas. Ĉarmas la enigma ludo kun la vortoj por trovi plej ekzaktan vojon por la penso. Povas esti tio diable malfacila, sed mirinde : Ĉiam montriĝas *ia* solvo de eĉ la plej komplika, senespera problemskemo de la versformo.

Vi ĵus vizitis Budapeŝton. Cu vi tie rilatis al adeptoj de la t.n. Budapeŝta skolo ?

Mi ĉiam sentis koran ligitecon al la iamaj *Literatura Mondo*-anoj. Tial estis plenumiĝo de arda deziro tiu ĉi kvazaŭa pilgrimado al Budapeŝto julion ĉi-jare. Ĝoje mi konstatis certan esperantistan aktivecon, ĉefe laŭ impulsoj de aliaj orientaj landoj. Hungaroj eĉ rilatas kun samideanoj en Sovet-Unio. *Baghy*, *Kalocsay*, *Tarkony* k.a. dum tiuj ĉi jaroj de ŝajna silento senĉese, mi kredas eĉ ĉiutage, aplikadis nian lingvon por la poezio. Baghy ja plurfoje lastatempe sendis specimenojn eksterlanden ; la du aliaj hezitas, verŝajne ĉar certaj malbone informitaj aŭtoritatoj nerekte komprenigis, ke rilatoj kun la (okcidenta) eksterlando estas nedezirindaj. Ĉe Baghy, nun pensiulo,

regas tre stranga kontrasto inter melankolia retirigemo kaj vivgaja bonhumoro.

Kion faras Kalocsay ?

Li estas vicedirektoro de granda hospitalo, famulo. Du vesperojn li tutprete, vikle deklamis, eĉ kantis antaŭ ni freŝajn tradukojn kaj originalojn. Li donis al mi manuskriptojn por du novaj verkoj: *Floroj de Malbono* de Baudelaire kaj la facilflua *Sepdek sep fabloj de Ezopo*. La libroj aperos venontjare en Kanariaj Insuloj kaj en Kopenhago. Sed krome Kalocsay tradukis dudekojn da poemoj de Heine, Mao Ce-Tung, krom latinaj, grekaj, egiptaj, persaj, babilonaj k.a. poeziaĵoj. Plej interesa estis lia ege aktualeca *Notlibro de poeto*, perfekta sonetaro pri la soci-politika evoluo hungara kaj tutmonda de 1933 ĝis nun. Giganta trezorejo! Sendube tiuj jaroj fandis novan personecon kun fortaj, klaraj konvinkoj.

Kiuj nun estas viaj vidpunktoj rilate la esp.-literaturon ?

Mi limigos min je la poezio, kiu ne malbone marŝas: Kerno de la Budapeŝta skolo restas (kreditu al ĝi S-anon *F. Szilagy* kaj lian admirindan revuon *Norda Prismo*); nun ĉe la skota skolo restas niaj ardaĵoj. Sed ankaŭ en Brazilo, Ĉeĥoslovakio, Norvegujo ktp. jam elkreskas novaj talentoj kiel fungoj neekstermeblaj. Sendube kontribuis al tiu florado la aklamindaj *Belartaj Konkursoj* de UEA, digna mecenato por arto sub malfacilaj kondiĉoj.—Ĉar verkadi nur en bluan ĉielon ne eblas. Mia deziro tial estas, ke nia esp.-popoleto fariĝu same poezi-konscia kiel ekz. la islanda popolo. Ni ne nur toleru versojn, sed ni klopodu alproprigi al ni la teknikon de la esp-a versarto. Nur tiel ni povos juste taksi kaj ĝuste kompreni poezion. Sed por atingi tion, niaj tro-singardaj, fundamente tro-lojalaj “respondeculoj” ĉesigu la tute nerealisman inokuladon de teruro pri t.n. neologismoj, la manao de versfarantoj. Male niaj lerniloj bezonas pli da legaĵo kun ili en poezia vesto.—Plej bela poezio estas verkebla nur per guteto de korsango. De legantoj ne decus postuli tiajn oferojn, sed almenaŭ toleremon, penetremon. Ne forgesu, ke ĉiu poemo gajnas per dua, atenta tralego!

Ĉu Komuna Konversacia Klubo, kiu eldonis vian *Rozoj kaj Urtikoj* intencas daŭrigi sian eldonagadon ?

Jes, ĝi esperas eldoni la menciitan *Sepdek Sep Fabloj de Ezopo* de Kalocsay, se antaŭpagos ĝin minimume 250 aĉetantoj antaŭ la jarfino. Frupagintoj ricevas favorprezon.

Do tiu ĉi ekscita evento dependas tute de la entuziasmo de la publiko ?

Jes.

Ni esperu, do, ke la publiko ĝustatempe pruvos sian ŝaton al nia literaturo per amasa antaŭmendo !

Mendojn kaj antaŭpagojn por la nova Kalocsay-volumo sendu antaŭ la 31a de decembro al: *Komuna Konversacia Klubo, Randbolvej 4, Kopenhago F, Danlando*. Dana ĝirkonto 96,289. Favorprezo por frupagintoj estos 8 d.kr.; \$1.15; ŝil. 8¼; fr.fr. 400; 16 steloj; 13 respondkuponoj aŭ egalvaloro afrankite.

La Redakcio de ESPERANTO

Per la julia numero nia ĝisnuna Redaktoro Hans Jakob adiaŭis la legantojn. Jam antaŭ la lasta mondmilito li dum multaj jaroj estis redaktoro de nia oficiala organo. Kaj post la milito, je la novorganizado de nia asocio, li fariĝis Honorofica Redaktoro. Pri liaj multaj meritoj kiel redaktoro, kiel ankaŭ pri aliaj fakoj, rakontis bele kaj prave S-ro Kürsteiner en la julia numero okaze de la 50-jara jubileo de Hans Jakob kiel esperantisto. En Bologna la Komitato ankaŭ montris sian ŝaton pri la farita laboro de Hans Jakob per la distingo "Honora Redaktoro", tiel indikante samtempe la kunligitecon inter la pasinta kaj la estonta tempo.

Antaŭ unu jaro S-ro Reto Rossetti konsentis fariĝi Helpredaktoro, trans-



Auld



Rossetti

prenante la zorgojn redakciajn, tre temporabajn. Kaj post la UK en Bologna li funkciis kiel Redaktoro, sed bedaŭrinde li promesis resti nur ĝis oktobro, inkluzive. Dum sia deĵoro Reto Rossetti montris ne nur grandan intereson sed ankaŭ grandan talenton je la plenumo de siaj taskoj. Multon li iniciatis kaj efektivigis kaj rilate al la enhavo kaj rilate al la aranĝo kaj ornamado de la teksto. Li mem arte desegnis multajn ilustraĵojn kaj cetere pretigis ankaŭ la novajn vinjetojn, kiuj plibeligas la revuon. En la nomo de UEA kaj aparte de la legantaro mi dankas al S-ro Rossetti pro lia sukcesa laboro kiel redaktoro. Ni ĉiuj nur bedaŭras, ke li pro siaj profesiaj okupoj ne povis daŭrigi.

Ekde tiu ĉi numero funkcias kiel Redaktoro S-ro William Auld. Esperantisto de 1937 li ekaktiviĝis en la movado je la jaro 1947 kaj post 1948 redaktas la revuon *Esperanto en Skotlando*. Li multe kontribuis al nia literaturo, i.a. per parto de la libro *Kvaropo* kaj per *La infana raso*, nun eldonata en la serio *Stafeto*. Ni kore bonvenigas nian novan redaktoron kaj deziras al li plenan sukceson dum multaj estontaj jaroj.

Ernfrid Malmgren
Prez. de UEA



Esperantista Vivo

Naskiĝoj

Albault. Al ges-roj André Albault en Toulouse, Francujo, naskiĝis la 14an de aŭgusto filino Ivelina, fratino por Bertrando.

Bernard. La 9an de septembro ges-roj Roger Bernard, Bois-Colombes, Francujo, ricevis filon nomatan Francis.

Jocham. Dum pasinta aprilo naskiĝis al ges-roj Jocham en Laupheim, Germanujo, unua filo.

Waysblum. S. H. Janca kaj Marek Waysblum en Londono ricevis la 9an de septembro filineton, kiu nomiĝas Ruth Janca.

Geedziĝo

Novy-Herbstová. La 8an de septembro geedziĝis en Onv Vršovice, Ĉeĥoslovakio, Ruŝenka Herbstová kaj muzikverkisto Zdenek Otakar Novy. Ilia geedziĝo estis benita en la Preĝejo de Sankta Johano en Košice.

Honorigo

Carlsson. La 2an de julio 1955 S-ro Martin Carlsson atingis la respektindan aĝon de 75 jaroj. Esperantisto jam de 1907, Martin Carlsson ĉiam laboris kaj ankoraŭ laboras por nia lingvo. Pro tio li estas nomita honora membro de Klubo Esperantista de Malmö.



Nekrologo

Eusebione. La 22an de septembro, post mallonga malsano, mortis Prof. Eusebio Eusebione en aĝo de 78 jaroj. Prof. Eusebione konis Esperanton jam en 1910, kaj multe instruis ĝin en Tripolio.

Sabaton, la 6an de Aŭgusto mortis D-ro **John Carl Flugel**, je aĝo de 71. D-ro Flugel estis aktiva Esperantisto ekde la jaro 1907, kaj dum la lastaj jaroj de la vivo estis Honora Prezidanto de la Londona Esperanto Klubo. Li estis profesoro pri psikologio ĉe University College en Londono ĝis 1944, kiam li fariĝis speciala lektoro. De la ĝenerala publiko li estis altestimata pro siaj verkoj pri tiu scienco; lia lasta libro, *Man, Morals and Society* (*Homoj, Moraloj kaj Socio*), verkita en 1945, estis lastatempe reeldonita en tre populara serio de diversspecaj libroj. Kapabla lingvisto, li estis konata inter fakuloj ankaŭ ekster Britujo, kaj ludis gravan rolon en pluraj organizaĵoj kaj kongresoj de sia medio, kaj britaj kaj internaciaj.

Tute neatendite forpasis je la 3a de Julio 1955 la multjara unua prezidanto de la Esperanto-Societo Berlin-Wilmersdorf, **Eugen Grasmair** sekve de apopleksio. Liaj meritoj kaj liaj grandegaj klopodoj pri la disvastigo de Esperanto ne estos forgesataj. La enterigo okazis laŭ lia deziro plej silente.

Vendita Fianĉino en Esperanto

La sekretario de la Esperantista Societo en Olomouc (ĈSR) informas, ke 3 solistoj de la ŝtata opero en tiu urbo nun lernas Esperanton kaj preparas gramofondiskojn kun la plej belaj arioj kaj duetoj el la fama opero *Vendita Fianĉino* de B. Smetana. La solistoj estas: S-ino D. Královcová (soprano), S-roj Zd. Svehla (tenoro) kaj Al. Tesař (baso). Ĉe fortepiano estas S-ino A. Rudolfová-Holešovská kaj St. Vrbík. En la regiono de Olomouc estas grandega interesiĝo pri Esperanto precipe inter la junularo. Tri novaj grupoj estas ĵus fonditaj.

J. Ribillard

Vagado sub palmoj (4)

Timudi

Virinaj Okupoj

TION oni nomas rivero! . . . Sur la mapo mi tamen legas nomon: “La Saŭra”. Sed mi vidas nur sablajn sedimentojn, ŝtonaĵojn, kriplajn tamarikojn kaj gumarbojn. La elsekiĝinta fluejo longe sterniĝas inter blondaj dunoj kaj senviva montplataĵo. Respektinda kadukulo, bruna kaj ŝrumpinta, al mi diras:—

“Estas akvo kiam pluvas.”

“Ha,” mi demandas, “ĉu ofte pluvas ĉi tie?”

“De sep jaroj ne falis eĉ unu guteto,” li respondas.


Nun mi scias pro kio mi ne vidas la riveron.

Sporadaj kaj same verdaj kiel la korundoj el nemezurebla rozario, laŭlonge de la Okcidenta Erg, la sensangaj oazetoj persiste batalas kontraŭ la malrapida sed nepra glutado de la sabloj, kiuj ilin kondamnis al neevitebla morto. Meze de la abomena dezerto ili obstine konservas obstinan vivaĉon dank’ al la akvotavolo, kiu subtere etendiĝas kaj ilin same nutras kiel mirakla suko naskas kromfoliareton sur velkinta trunko. Efektive, tra la maldensa kurteno el flekseblaj palmoj mi distingas, zorge rektliniajn, strangajn konstruojn: ili estas putoj kun balancostango, el kiuj nigraj sklavoĵoj ĉerpas la karan akvon.

Sur la kruta bordo de la nuda montplataĵo, kiu superas la malplenan valon, staras masiva kaj fortika kastelo, kies ruboj enloĝigas nur cerastojn

kaj skorpiojn. En la malpacaj tempoj, kiam la timindaj berberaj nomadoj rabatakis la riĉajn karavanojn kaj ruinigis la kulturitajn palmarojn, tien rifuĝis la tuta loĝantaro kun siaj brutaroj, posedaĵoj kaj provizoj. La forlasita vilaĝo estis eldetruita, sed post vana sieĝo la neniontrafinta hordo retiriĝis kiel furioza marfluo venkita de neŝancebla klifo. Tiam la necedemaj homoj reokupis siajn cindrigitajn hejmojn kaj ilin tuj rekonstruis el premita tero kaj palmobranĉoj. Denove prosperis la dometaro ĝis la estonta rabirado.

La antikva citadelo, nun senutila, forvelkas pro la terura erozio de la vento kaj sablo; nur la dikaj muroj staras kiel emocia atesto pri turmenta periodo por ĉiam pasinta.



Transe de la nevidebla *Saïra*, ĉe la piedoj de la altaj dunoj susurantaj pro la nelaciĝanta vento, kiu ludas per la sableroj, la verdanta palmareto silente sunvarmiĝas kiel pacema lacerto. Tie unutone fluas la vivado, sen ĝojo, sen zorgo. La sola agemo observebla estas tiu de la virinoj.

Sur terpecoj ĉirkaŭbaritaj per spitaj dornuoj, virinoj kun belaj kaj nudaj brakoj prilaboras sensukan grundon. Ili ĉiuj surportas samaspektan robon el blua katuno, longan kaj senmanikan tunikon laŭ la antikva modo, kaj sur la kapo plurkoloran tukaĉon. Senbrue sed diligente la bluaj siluetoj superkampe kliniĝante skrapas, irigacias, semas, plantas, rikoltas la grenon, ĝin draŝas kaj enamforigas. Apude, surtere trenante sian barbeton, kelkaj malgrasegaj kaprinoj serĉadas duban herbaĉon, dum piedligita azeno blekadas pro enuo kaj mizero.


Post tiu ĝardenludo la virinoj preparas la familian kuiraĵon, ordinare griaĵon, malofte viandon, kun selakto. Ili ne manĝas kun la viroj, sed ĉe aparta flanko, nur post kiam la mastro plaŭde ruktis, tiel pruvante ke li plensatas.

Ili sin provizas per brulligno el tamariko, ofte je plurdek kilometroj meze de la Grandaj Dunoj. Dum tiu ekskursado, kun surkapa ŝarĝo de kvindek kilogramoj, kelkaj el ili mortas pro trostreĉo de siaj fortoj. Ne tre grave estas, ĉar virino pli malmulte kostas ol dromedaro aŭ azeno, kaj se maljuna estas la forpereinino, oni kompreneble profitas el la ĵusa okazo por aĉeti belulineton pli logan kaj fortan.

En marcêto ili lavas la tolaĵon per siaj piedoj kvazaŭ polkante. Dum tiu absorba laboro niaj sinjorinoj klaĉadas kiel klukantaro da monduminoj ĉe tekunveno en Ritz-Hotelo. Tie oni komentas ĉiujn faktojn kaj novaĵojn de la regiono ; oni neniun indulgas, nenion forgesas. Senbride galopas la langoj laŭ takto de la lertaj moviĝoj de la piedoj, kiuj premas, tordas, knedas la blankan tolaĵon. Krome ili ofte naskas, kaj mamnutras nombrajn infanojn, kiujn ili surdorse ĉien kunportas kvazaŭ naturan ĝibon. Ekde la demamiĝo la buboj senhelpe, senzorge kreskas kaj memstare sin edukas kun la kaprino, la hundo, la kokinoj kaj kelkaj centoj da viglaj muŝoj.

Ili ankaŭ melkas la dromedarinojn, kies dube flavan lakton ili transformas en bongustan buteron. Tiu butero utilas al la kuiristinoj, kaj plie al la elegantulinoj por ŝmiri sian densan nigran hararon, kiun ili plektas en mil serpentoj rebrilaj kaj bonodoraj sub la ĝoja suno de somero. La operacio okazas nur unu fojon ĉiujare. Tiel dank' al sia parfumo oni postsekvas belulinon kiel parizaninon sur la Champs-Élysées.

Bonŝance, krom du-tri maŝoj kaj unu ŝlosebla kestego entenanta la geedzajn riĉaĵojn, nenia meblo embarasas la unikan ĉambron de la dometo. Tial rapide elfarita estas la ĉiumatena mastrumado. Nek balailo, nek




Timudi

polvosuĉilo : tra la malfermita pordo la suda ventego periode forblovas la ĵetaĵojn.

Kaj la viroj ? . . . Kie kuŝas la viroj, vi demandas ? . . . Mi ne scias, ilin oni ne vidas. Kaŭrante en la varma ombro ili kviete konversacias kaj rigardas kreski la daktilojn, antaŭtaksante la rikolton kaj dronante en senfinaj revoj.

Paradiza lando, benita lando, kie oni majstre scias ĝui la veran vivodolĉon . . .

cerasto : kornohava serpento (vd. Biblio, Gen. 49. 17)



Nia Forumo

Ni invitas la legantojn paroli libere pri temoj, kiuj interesas ilin.
Tro longajn leterojn ni eble iom koncizigos.

Esperanto en ĉiu telefonlibro !

Parolante pri utilo de Esperanto, ni ofte renkontas dubemulojn, kiuj demandas : “Venante en eksterlandon, kiamaniere vi trovos esperantiston ? Vi ja konsentas, ke li provizore ne estas renkontebla en ĉiu stratangulo aŭ almenaŭ en ĉiu hotelo ?” Ni havas jam preparitan respondon, en kiu ni klarigas la rolon de nia internacia organizo Universala Esperanto-Asocio kaj de ĝiaj honoraj reprezentantoj, la UEA-Delegitoj.

Iuj kontentiĝas kaj admiras tiun ĉi aranĝon. Eble pro ĝentilo, ĉar neesperantistoj apenaŭ povas imagi la vere mirindan funkciadon de tiu servo.

Ni provis plivastigi utiligeblon de nia lingvo kaj fari tiun eblon pli klara al la ekstera publiko. Ni metis en tre multajn gravajn stacidomojn de Ĉeĥoslovakio samformajn tabulojn kun granda verda stelo, kun surskribo *Esperanto-Informo* kun aldonitaj adresoj de lokaj esperantistoj. Ni kompreneble ne povis diri, ke simila aranĝo ekzistas ĉie tra la mondo, kvankam ĝia diversflanka utilo—ankaŭ laŭ vidpunkto propaganda—estas evidenta.

Mi proponas plui en tiu ĉi direkto, t.e. fari utilon de Esperanto pli palpebla por eksterstarantoj. Ni zorgu, ke en ĉiu telefonlibro estu sub “Esperanto” atingebla persono, kun kiu oni povas paroli en nia lingvo. Tia ekstra publikigo kostas malmulton, ie ĝi estas eĉ senpaga. Esperantisto posedanta telefonon, konsideru sia devo, ke li estu trovebla en loka telefonlibro ankaŭ sub nomo de nia lingvo. Se estas ebla elekto, tiam aperu sub “Esperanto” nomo de samideano informita, kiu povas doni informojn pri nia lingvo al neesperantistoj. Mi povas diri laŭ sperto, ke tiuj alvokoj venos.

Mi ne volas troigi la signifon de tiu ĉi aranĝo, sed oni povas facile kompreni ĝin. Mi kredas, ke ĝi povas kaŭzi gravan paŝon antaŭen.

Ota Ginz

Esperantaj voknomoj


Kial nur malmultaj Esperantistoj donas al siaj infanoj esperantaj voknomojn ? Ni pensas, ke ili ne konas belsonajn esperantaj voknomojn aŭ ne kuraĝis formi ilin mem. Doninte al nia filo la nomon “Alko” ni spertadas, ke tio ofte donas al ni la eblecon paroli pri nia lingvo sen altrudo. Oni rimarkas la nekonatan nomon kaj demandas pri ĝi. Certe ni ne volas, ke niaj infanoj havu malagrablaĵojn pro siaj esperantaj nomoj. Tial laŭ nia opinio tiuj nomoj devas plenumi jenajn kondiĉojn :

1. Ili estu belsonaj ankaŭ al oreloj de iliaj kunuloj.

2. Ili ne havu supersignojn, se tiuj ne ekzistas en la koncerna nacia lingvo.

Tre grave ŝajnas al ni krome, ke oni eksciu tuĵ de la nomo, ĉu temas pri vira aŭ virina. Ni pro tio nepre apliku la regulecon de Esperanto ankaŭ por la voknomoj. Ĉar en multaj lingvoj la virinaj nomoj plej ofte finiĝas per -a, ni proponas, ke ni ankaŭ apliku tion en Esperanto. Ankaŭ je esperantigo de naciaj voknomoj oni apliku tion, por eviti miskomprenojn. La virina germana nomo “Inge” estu esperantigita “Inga”, ĉar “Ingo” estas germana virnomo. Se el virnomo “Erwin” fariĝas “Ervino” oni komprenu, ke temas pri viro. “Ervina” estu la virina formo, k.t.p. Sed laŭ nia opinio pli dezirinda ol esperantigi jam ekzistantajn nomojn estas krei mem originalajn esperantlingvajn. Ĉar prae oni kreis la nomojn laŭ proprecoj aŭ deziroj, kvankam oni ofte ne plu ekkonas tion hodiaŭ, ni proponas, ke ni provu fari tion kreante novajn nomojn. Ĉu vi emas kunlabori ? Ni kolektas originalajn esperantaj nomojn kaj volas multobligi ilin en speciala listo. Bonvolu sendi al ni viajn sugestojn. Jen kelkaj ekzemploj : Virto, Forto, Falko, Diodono, Dianta, Erika, Papilia, Gracia, Inja, Abela, Aminda.

Ges-roj Eichholz,
Esperanto-Domo, Port Sydney,
Ontario, Kanado



Novaj Libroj

Duope ricevitaĵn verkojn ni recenzas ;
unuope ricevitaĵn ni nur mencias.

* = ricevebla ĉe U.E.A.

Ogura-Toyofumi : **Kun la kadavro de l' edzino.** El la japana trad. Tanaka-Sadami. 52 pp. Prezo 6 rpk. El la verkoj de Mizuno-Hiroŝi kaj Gotoo-Cutomu : **La ĉasteco de Japanio.** 41 pp. Prezo 4 rpk. Kansai Ligo de Esperanto-grupoj, Nakacuhamadoori 2-20, Ojodo-ku, Osaka, Japanujo.

La japanoj, kiuj solaj spertis la terurojn de atoma milito, alarmas kaj avertas la mondon. Ĉu la mondo—t.e. vi kaj mi, la “ordinaraj” personoj—aŭskultas ?

Prezentu al vi, ke vi, kiel la aŭtoro de *Kun la kadavro de l' edzino*, suprengrimpas monteton, atendante vidi preter ĝi vian urbon. Vi atingas la supron, kaj—

“La ŝoko en la momento estis tute ne komparebla kun tio en la unua fulmobrilo . . . Hiroŝima . . . estis nura maso nigra de bruligita tero. Nenio sin trovis. Estis nur ruino de bruligitaĵo nigra, ebena ĝis la horizonto !”

Kaj poste, inter kadavroj :

“Ĝuste tiam, kiam mi sentis ĉe miaj fingropintoj malvarmecon de haŭto de la kadavro, mi sentis kvazaŭ la manoj ekglitis. Mi ekhavis abomenan senton neniel esprimeblan. Mi rimarkis ke muskoloj de ambaŭ kruroj estis brilantaj per sunradio en la sama koloro de tomato elŝeligita. Haŭtoj malsupre de genuoj estis elŝeligitaj kiel piedoj demetintaj ŝtrumpojn, kaj ili kovris duonon de miaj manoj.”

Se vi ankoraŭ ne konvinkiĝis profunde kaj komplete pri la absoluta malhomeco de la atoma milito, legu tiun ĉi modere verkitan, neniel sensacian, volumeton.

Kun la kadavro de l' edzino estas aparte grava kaj havenda libro pro tio, ke ĝi enhavas ilustre partajn reproduktajn de la grandiozaj pentraĵoj de Maruki-Iri kaj Akamacu-Toŝiko, aktuale ekspoziciataj kaj ĉie admirataj en Eŭropo.

Atombomboj, morto kaj korpa vundiĝo ne estas la solaj abomenaĵoj, kiujn alportas la milito. Ankaŭ la sociaj sekvoj kaj anima detruigo estas tiel same abomenaj, kaj tiel same sangmakulas la manojn al ĉiu persono senescepte, kiu helpas aŭ eĉ nur per sia silento permesas la militagadon. Multaj legantoj ne volos kredi, ke la enhavo de *La ĉasteco de Japanio*, kiu pretendas priskribi militsekvojn en tiu lando, estas vera kaj fakta. Tiel teruraj, tiel naŭzaj, estas la priskribitaj faraĵoj, ke oni preferos ne kredi ilin. Aliaj, pli kuraĝaj, supozos, ke la aŭtoroj troigas. Ĉiu leganto devos pri tio decidi mem. Sed kiu vidis iomete militon, tiu scias, ke tiaj aferoj fakte okazadas. Kaj kiu ne vidis militon, tiu devas prezenti al si, ke se eĉ nur malgranda parto de la enhavo de tiu ĉi libro estas vera, tio sufiĉas por kondamni absolute sen rezervoj la militon kaj iun ajn, kiu ĝin entreprenas.

W. Auld

***Sveda Poemaro.** Kolekto da poemoj tradukita de Magda Carlsson. 112 paĝoj, papera bindo. Eldonis Eldona Societo Esperanto, Stockholm 1954. Prezo 6.- sv.kronoj plus afranko (9ŝ., afranko 4p.).

Antaŭ ni defilas 29 majstroj de la sveda poezio reprezentataj de 74 poemoj, inter kiuj radias multaj juveloj. Kun ĝoja koro ni migras de paĝo al paĝo. Kiom da ĝuiga belo enestas en la senmankaj tradukoj de Magda Carlsson! Tiu ĉi poetino, konata al la antaŭmilitaj legantoj de Literatura Mondo per altnivelaj poemtradukoj, prezentiĝas al ni en Sveda Poemaro kiel majstrino, kiu suverene regas la tradukarton kaj plenas de poezia sentado. La poemoj elektitaj ne laŭ ia skolmontra skemo, sed laŭ individua ekŝato de la tradukintino perfidas al ni ŝian delikatsentan, noblan kaj pian animon. Modesto kaj humilo spiras el pura kaj granda arto de tiu ĉi brila poezia tradukverko.

Sed ne nur majestaj versoj levantaj sin en artisme malordinara vesto kun pieco al Dia trono, himnoj al Eternulo, al Virgulino Maria, bildoj bibliaj, estas la sfero, en kiu sekure moviĝas la unika talento de Magda Carlsson. Ŝi scias same rave kaj konvinke redoni al ni motivojn aliajn, ĉiel homajn: amon, pasion, mizeron kaj humoron.

Kaj ne estu lastloke menciite, ke tiun ĉi tradukantaron karakterizas profunda konsciencemo. Ŝiaj tradukoj pruve montras, ke la poetino ĝiskerne penetras la tradukatan verkon kaj ĝin fajne prilaboras ĝis fina neto. Rimoj plensangaj kaj perfekta ritmo ornamas la versojn, kies poezia penso ne suferas perfortan trakton.

Legante tiajn gemojn, kiel *El la juda tombejo de Praha, Temp' atenda,*

La Mortintoj aŭ *Exit Isídoro Filén*, por citi iujn el multaj samvaloraj, ni aprezas kun admiro la facilan naturan fluon de la repoemigita verko, en kiu perfekta formo nuptas kun poezie kaj ideo senmanka enhavo fariĝante nova pruvo pri poezia taŭgeco de Esperanto.

Nemirinde, ke ĉe Magda Carlsson, kiu kun tia dorlota amo malfermas la trezorejon de nia lingvo, oni ne sukcesas trovi lingvajn kritikeblaĵojn. Nur en *Tiam estis helaj la tagoj* mi preferus uzi laŭ *Plena Vortaro* "ranunkolo" anstataŭ *ranunkulo* laŭ la latina termino, cetere facile farebla ŝanĝo, ĉar ne temas pri rimvorto.

La poemaro estas ankaŭ grafike aranĝita kun belgusto; preso kaj papero estas unuarangaj; forestas preseraroj. La elstara verko meritis tolbindon. Al ĉiu esperantisto mi povas senrezerve rekomendi ĉi tiun serenetosan libron.


Jiri Korínek

Fotono ĉe Juĝejo de S. Tomonaga. El la japana trad. kelkaj junaj fizikistoj en Osaka Universitato. Eldonis Japano Esperanto-Instituto, Tokio-Hongo-Motomati, Japanujo. Prezo 3 rpk.

Utiligo de scienca fakto aŭ teorio kiel bazo por rakonto ne estas nova, sed jen kredeble la unua fojo, ke la moderna fiziko aŭ, pli precize, la kvantuma mekaniko aperas en tia rolo. La aŭtoro bildigas juĝejon, en kiu pledas unu "fotono", kiu supozeble faris iun krimon. Grava estas la demando, "Tra kiu el la du fenestroj vi eniris?" Fotono respondas trankvile, ke li trapasis ambaŭ samtempe. La juĝisto tute ne volas akcepti tiun respondon, sed klera advokato pravas per eksperimentoj, ke tio ne nepre estas neebla por fotono, tamen certe jes por ordinara homo. Tiel la aŭtoro uzas la novajn ideojn de moderna fizika scienco por fari allogan rakonteton, kiu certe interesos fizikistojn, sed ankaŭ devus esti sufiĉe facile komprenata de nesciencistoj.

La traduko fluas facile, kaj entenas tre malmultajn neologismojn, kiuj cetere estas klarigitaj ĉe la fino. Entute, jen tre leginda kaj amuza rakonteto.

E. F. Relf



Radio

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la disendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso.

Dimanĉo	23.00–23.30	Bilbao. 265m. P. Radio Bilbao, Hispanujo.
Lundo	12.30–13.00	La Coruña. 250m. P.K. Radio Juventud, Real 71, La Coruña, Hispanujo.
	22.45–23.00	Hilversum. 402m. P. N.C.R.V. Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando (nur unu fojon ĉiumonate).
Mardo	11.55–12.00	Bern. 48.66m., 31.46m., 16.87m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern.
	14.30–14.45	Montevideo. 280m. P. Radio Ministerio Ganaderia y Agricultura, Montevideo, Urugvajo (nur la unuan mardon de ĉiu monato).
	14.50–15.00	Ljubljana. 327m., 211m. K. Radio Ljubljana, Jugoslavujo.
	17.35–17.40	Bern. 48.66m., 31.46m., 16.87m. P. D-ro Baur.
	19.15–19.30	Carlet. 288m. I. Radio Carlet (Valencia), Hispanujo.
Merkredo	15.30–15.40	Wien. 203m., 48m., 41m., 30m., 25m. P.
	16.00–16.10	Caramulo. 205m. I. Rádio Polo Norte, Caramulo, Portugalujo.
	18.10–18.25	Roma. 49.92m., 31.33m. P. S-ro Minnaja. Radio Roma, Casella postale 320, Roma, Italujo.
	22.05–22.15	Wien. 513m., 48.74m., 25.46m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
	22.15–22.20	Hilversum. 298m., 188m. I. V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
Ĵaŭdo	06.45–06.50	Perpignan. 202m. K. Radio Perpignan-Roussillon, Perpignan (Pyr. Or), Francujo.
	08.30–08.45	Paris. 348m., 249m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	17.35–17.40	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	22.30–23.00	Valencia. 200m. I.K. Radio Alerta, Colón 11, Valencia, Hispanujo.
	22.45–23.00	Zagreb. 264m. I. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
Vendredo	18.10–18.25	Roma. Kiel merkrede. P. D-ro Musella.
	19.15–19.30	Carlet. Kiel marde.
	21.30–21.45	Guatemala Cd. 370m., 197m., 47m., 30.50m. I. Radio-Esperanto, La Voz de Guatemala, Gvatemalo, Mez-Ameriko.
Sabato	08.30–09.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.7m. K.I. Radio Ministério da Educação, Rio de Janeiro (DF), Brazilo.
	18.45–19.00	Barcelona. 360m. I.K. Radio Unión, Emisora del Frente de Juventudes, Barcelona, Hispanujo.
	22.15–22.20	Hilversum. 402m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

Radio Roma. 2.XI, Mondo Esperantista ; 4.XI, Julio Verne okaze de la 50a jaro de lia morto ; 9.XI, Novaĵoj el Italujo ; 11.XI, Leterkesto kaj bibliografio ; 16.XI, La Liguria Riviera ; 18.XI, Olimpiaj Ludoj kaj Esperanto ; 23.XI, La parolantaj statuoj en Romo ; 25.XI, Cortina d'Ampezzo, sidejo de la Vintraj Olimpiaj Ludoj ; 30.XI, Italujo en la poezio de Poul Thorsen.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Administra Oficejo : Eendrachtsweg 7, Rotterdam C., Nederlando

OFICIALA INFORMILO

N-ro 276

3an de oktobro 1955

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de septembro kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de septembro 1954 :—

	1954	1955
Asociaj membroj ..	7782	7946
Individuaj membroj :		
MJ 981		924
MA 3894		3936
MS 727		820
Pat. 7		9
DM 276		291
HM 59		58
	5944	6038
	13726	13984

NOVAJ DELEGITOJ :

Alĝerio

Alger. VD : S-ro Paul Tournon, B.O. 122.
Tel : loĝejo 722.45, oficejo 677.64.

Britujo

Rickmansworth (Herts.). FD (Rotario) : vakas.

Danlando

Aarup (Fyn). D : F-ino A. E. Erlandsen (dentteknikistino), Lindevej 7.
Tel : 404.

Francujo

Besançon (Doubs). VD : F-ino R. Correy, 20 rue Bersot.
FD (instruado) : la VD.

Busigny (Nord). D : S-ro G. Coutteau (profesoro), 24 Rue des Poilus.
Tel : 73.

Claye-Souilly (Seine & Marne). D : S-ro G. Gerrier (ŝtatlaboristo), 3 Rue de Souilly.

Nice (Alpes Maritimes). FD (Budhismo) : S-ro J. Ribillard, 15 Avenue du Ray.
FD (Turismo) : S-ro J. Kriebig, 31 Rue Guiglia.

Niort (Deux - Sèvres). FD (Religioj-teozofio) : F-ino M. Ducloux, 2 rue du Clou Bouchet.

Paris. FD : vakas.

Germanujo

Adenstedt. D kaj FD : Vakas.

Berghausen (22c). D : S-ro K.-A. Kaeser (lernejano), 22c Berghausen Bez. Köln.

Bünde. D : vakas.

Dortmund (Nordrhein/Westfalen). D : S-ro H. Rosenträger, Dortmund-Wambel, Kastanienplatz 26. Tel : 30141.

Fischbachau (Oberbayern). D : S-ro G. Beutke (inĝeniero), Birkensteiner Strasse 12 1/5.

Fulda (Hessen). FD (Turismo) : S-ro F. Lautenbach, Abtstor 21. Tel : 2541.

Gottingen (20b). VD : vakas.

Hamburg. FD (Juro) : D-ro W. Lippmann, Grillparzerstrasse 4 I, Hamburg 21.
Tel : 23 63 28.

Hispanujo

Madrid. D : S-ro F. Enfedaque Tremps (oficisto), S. Bernardo, 35, 3 derecha.
Tel : 21-63-85.

Irlando

Belfast. FD (Historio) : vakas.

Izraelo

Geveram. D : S-ro D. Tachauer (profesoro pensiita), Doar Na, Hof Aŝkelon.

Jugoslavio

Beograd (Serbio). FD (muziko) : S-ro B. Trudić, Kopernikova 14, Beograd II.

Norvegujo

Fredrikstad (Østfold). D : S-ro A. Halvorsen (stokesjestro), Trosvikhamna 21.

Svislando

Bern. FD (Magio) : S-ro H. Herrmann, Könizstrasse 216, Liebefeld-Bern.
Tel : 5.97.40.

FD (vegetaranismo) : F-ino G. Weigelt, Gurtengartenstr. 12 Spiegel bei Bern.
Tel : 2 55 19.

Biel-Bienne (Berne). FD (instruado) : S-ro M. Erbetta, Rue des Pins 66.
Tel : 032/2 95 92.

Fislisach (Aargau). D : S-ro J. Koch (oficisto), im Feld.
FD (Kursgvidado) : la D.

Genève. FD (Stenotipio) : S-ro E. C. Strutt, 6 rue du Vidollet.

Neuchâtel (Suisse Romande). FD (instruado) : S-ro R.-W. Perrenoud, "Monruzy," Neuchâtel 8. Tel : (038)5.24.42.

Usono

Milan (Michigan). D : S-ro P. E. Nace (elektra inĝeniero), 318 Case Street.
Tel : 6196.

FD (Elektra inĝenierado) : la D.

Urugvajo

Colonia. FD (radiotekniko) : S-ro V. E. Pons, UTE. Tel : 106.

NOVAJ KOMITATANOJ :

Epstein, S-ro Felix, Haynstrasse 5, Hamburg 20, Germanujo.

Deubler, S-ro Konrad, Agnesstrasse 5/III, München 13, Germanujo.

Reuchlin, S-ro Richard, T 6, 18, Mannheim, Germanujo.

Spruch, D-rino Christa, Schroerstr. 21, Krefeld, Germanujo.

NOVA HONORA MEMBRO :

Fernández Menéndez, S-ro M., Montevideo, Urugvajo.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ :

Coveney, S-ro P., Carrigaline, Irlando

Touron, S-ro Paul, Alger, Alĝerio.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1955 :

761. Perfect, S-ro S. R., Wellington, Nov-Zelando

762. Lind, S-ro E., Trollhattan, Svedujo

763. Fabjan, S-ino E., Bregenz, Aŭstrujo

764. Ohlsson, S-ro C., Stockholm, Svedujo

765. Colliander, S-ino M., Hägersten, Svedujo

766. Rizzo, D-ro P., Reggio Calabria, Italujo

767. Martins da Cruz, S-ro A. B., Benguela, Angolo

768. Lopes Pereira, D-ro B., Barcelos, Portugalujo

769. Haugen, S-ro S. L., Kongsberg, Norvegujo

770. Bainbridge, F-ino J., Carlisle, Anglujo

771. Sattley, Cpl. Kirk, Straubing, Germanujo

772. Martin Arroyo, S-ro J., Oviedo, Hispanujo

773. Kobler, S-ro J. W., St. Gallen, Svisujo

774. Stahl, S-ro C. D., Stuttgart-W, Germanujo

775. Biewer, S-ro J., Neu Isenburg, Germanujo

776. Kreibig, S-ro J., Nice, Francujo

777. de Oliveira, S-ro Bernardino A. S. C., Lisboa, Portugalujo

778. Rødsaa, S-ro E., Sauda, Norvegujo

779. Ranwell, S-ro B., Enfield, Anglujo

780. Trudić, S-ro B., Beograd, Jugoslavujo

781. Turner, S-ro G. P., Middleton, Usono

782. Serfass, S-ro F. R., Allentown, Usono

783. de A. Alves, S-ro C. O., Salvador, Brazilo

DONACOJ al la Ĝenerala Kaso : M. Jerhorolt, 55ŝ. 2p. ; R. Barta, 3ŝ. 4p. ; D. Kennedy, £7 ; A. Solar, 25ŝ. 8p. ; P. R. Geerinck, 8ŝ. ; A. Lomo, 10ŝ. 6p.

DONACOJ al la Fondaĵo Montevideo : E. Hansen, 5ŝ. ; Brazilia Esp.-Ligo, 10ŝ.

GRAVA ATENTIGO. Ni petas ĉiujn membrojn pagi siajn kotizojn por 1956 al la ĉefdelegitoj, perantoj, aŭ landaj asocioj precize kiel ĝis nun. La Administra Oficejo ekfunkcios en Rotterdam la 15-an de novembro, pri kio ĉiuj ĉefdelegitoj, perantoj kaj landaj asocioj ricevos ĝustatempe informon. Ĝis la ekfunkciigo de la oficejo en Rotterdam, la tuta administra laboro estas normale plenumata, kiel ĝis nun, en la oficejo de UEA en Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo.

M. H. VERMAAS,
Administrantino.

Internacia Konkurso 1955

Stato je la 80a de septembro

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Jugoslavio ..	1750	2609	149.0
2.	Izraelo ..	250	330	132.0
3.	Japanujo ..	900	1185	131.6
4.	Aŭstrujo ..	1200	1480	123.3
5.	Maroko ..	750	905	120.2
6.	Germanujo ..	3700	4275	115.5
7.	Aŭstralio ..	1000	1145	114.5
8.	Francujo ..	5100	5832	114.3
9.	Finnlando ..	2500	2855	114.2
10.	Hispanujo ..	1600	1805	112.8
11.	Danlando ..	2500	2765	110.6
12.	Nederlando ..	4600	5024	109.2
13.	Svislando ..	1600	1720	107.5
14.	Usono ..	2300	2502	108.2
15.	Novzelando ..	800	854	106.7
16.	Urugvajo ..	300	320	106.6
17.	Italujo ..	2900	3005	103.6
18.	Belgujo ..	2100	2113	100.6
19.	Portugalujo ..	500	495	99.0
20.	Kanado ..	300	345	98.6
21.	Svedujo ..	5900	5575	94.5
22.	Islando ..	350	330	94.3
23.	Brazilo ..	6400	5960	93.1
24.	Sudafriko ..	350	305	87.1
25.	Meksikio ..	350	210	84.0
26.	Britujo ..	9200	7577	82.3
27.	Saarlando ..	250	180	72.0
28.	Norvegujo ..	2200	1570	71.3
29.	Kubo ..	250	150	60.0
30.	Irlando ..	250	150	60.0

ANONCETOJ

Kosto : *du pencoj por ĉiu vorto, aŭ 1 respondkupono por ĉiu duo da vortoj.*

La oficiala aperdato de la revuo estas la 1-a de ĉiu monato. Anoncetoj devas atingi la Centran Oficejon kvin semajnojn antaŭ la aperdato de la celata numero.

Sed la spirito en la homoj kaj la spiro de la Plejpotenculo donas al ili prudenton.

Ijob 32. 8.

La tuta mondo direktu skribaĵojn al nia grandioza letervespero 27.I.1956. Ĉiun ni kontentigos ! Flugu senprokraste al : O. Hrubeš, Stalingradské 55, PARDUBICE, Ĉeĥoslovakio.

Deziras interŝanĝi P.K.I. kaj L. kun ĉiuj landoj F-ino Iná Beleza, Rua Dores do Indaiá 15, Belo Horizonte, Minas Gerais, Brazilo.

Londona gastejo, agrabla loĝloko. Lito kaj matenmanĝo po 14ŝ. 6p. por ĉiu nokto. Prezoj malaltiĝas laŭ loĝdaŭro. Oni parolas Esperanton kaj la francan. A. Bytheway, "Flat Four," 1, Warrington Crescent, LONDON, W.9, Anglujo. Telefono CUNningham 4487.

Kongresa Letero-konkurso. La Canberra Esperanto-Klubo anoncas leteran konkurson rilate al la 16a Tut-Aŭstralia Kongreso, kun premio de £5 5ŝ. Skribu al "La Rondo" tian leteron, kian vi mem ŝatus ricevi, pri la kongreso ; limo 100 vortoj. Partoprenantoj en Aŭstralio pagos 1ŝ. ; tiuj transmari respondkuponon por ebligi sendon de senkosta raporto pri la Kongreso. Vidu "La Rondon" ĉiumonate por la publikigindaj ensendaĵoj. Adreso : M. F. Gamble, S/S Largs Bay, Aŭstralio.

La Internacia Ludoĉambro por infanoj kaj gejunuloj serĉas : (1) junan, bone edukitan instruistinon, kiu nepre parolu Esperanton. Salajro laŭ kvalifikoj. Vegetarano preferata. (2) Du junulinoj-lernantinojn, kiuj interparolas Esperanton. Instruado estos donata al ili, same restado kaj "poŝmono". (3) La infanoj kaj gejunuloj de la Internacia Ludoĉambro serĉas korespondamikojn inter infanoj kaj gejunuloj, kiuj partoprenos la kongreson en Kopenhago 1956. Oni sin turnu al : La Internacia Ludoĉambro, Hartmannsvej 23, Hellerup, KOPENHAGO, Danlando.

Interŝanĝe por lernolibroj de Havajgitaro kaj Hispangitaro mi sendos pli valoran uzitan aŭ neuzitan poŝtmarkseriojn. Lászlo Izsó, BUDAPEST VIII, Bezerédi-u. 10, Hungarujo.

Filatela kaj Numismatika klubo. La anoj de nia klubo havas sufiĉe da duplikatoj de moneroj kaj poŝtmarkoj por interŝanĝi ĉiulande. Ni sendos unue, kaj ĉiam afrankos filatele. Adreso : Filatela kaj Numismatika

Klubo, ĉe Josep Cervelló, La Riba 12, TARRASA, Barcelona, Hispanujo.

Fervojisto, trakingeniero, kun longa sperto ĉe 1 m. kaj 1.067 m. spuroj en tropiklandoj, nun laborante ĉe 1.435 m. spuro, deziras korespondi kun iu samfakulo ĉe 1.524 m. spuro. Roy Guenin, 46 Balcombe Avenue, WORTHING, Anglujo.

La Esperanto-klubo "Hoogezand-Sappemeer" aranĝos letervesperon en decembro kaj petas leterojn kaj ilustritajn poŝtkartojn el la tuta mondo. Respondo garantiata. Adreso : F-ino B. F. Kliphuis, Singel 27, HOOGEZAND, Nederlando.

Turista Servo por Benelukso. Petu turistan kilometran karton, prospektojn, informojn al Robert Loeckx, FD UEA, Ministeria Gvidisto Turista, Konijnenperken, 109, BOSVOORDE-BRUSSEL, Belgujo, kontraŭ sendo de pm. aŭ RK. Tel : 723222.

Bild-poŝtkartojn el malproksimaj landoj (precipe Usono, Aŭstralio, Afriko, Ĉinujo k.t.p.) tre danke ricevus samideanino en Aŭstrio, S-ino V. Lichtenwallner, GAMLITZ (Stmk.), Aŭstrio.

Poŝtmarkojn, kvanto kontraŭ kvanto, bildkartojn (ankaŭ kun salutvortoj), korespondado, interŝanĝas ĉiam : E. Rossi, Viale Rapisardi 44, CATANIA, Italujo.

Universitatulo korespondas ĉiuteme kaj interŝanĝas naciajn kalendaretojn. G. Battiato, Casellapostale 11, CATANIA, Italujo.

Tutmondaj Esp. ligoj, societoj, grupoj, izoluloj ! Ĉu vi jam konas miajn belajn esperantaĵojn, la Esp. ludon Roli, Esp. insignojn el emajlo, pordoŝildetojn Esp. parolata ? Kiam ne, tiam senprokraste postulu mian prezliston. Sendebleco ĉiulanden. Agemaj reprezentantoj kaj revendistoj ĉiulande serĉataj. Skribu al Hans Gruber, (13b) POCKING-HAID, N. Bay., Germanujo.

Plej moda ornamaĵo kaj butonoj el vitro, metalo aŭ plastiko, kolieroj, braceletoj, orelklipsoj, broĉoj, orel- kaj fingro-ringoj, ĉenetoj, krucetoj, incensujoj, ĉiuspecaj religiaj artikloj, rozarioj, krucifiksoj, medalionoj kaj ĉiuspecaj vitraĵoj estas haveblaj. Memaĉetantoj kaj agemaj reprezentantoj ĉiulande serĉataj. Skribu bonvole al : Enrich Wilde, Josefstrasse 5, aŭ poŝtfako 193, SCHWAEBISCH GMUEND, Germanujo.

la nica literatura revuo

sub ĉefredaktoreco de
Prof. G. Waringhien
kun kunlaborado de
la plej famaj verkistoj
aperas ĉiun duan monaton
32/40 paĝa - - poŝformata
jare fr. fr. 400.- aŭ egalvaloro

Ricevas la abonojn :

En Francujo : R. Fiquet, Poŝta konto
2259-98 Marseille

Alilande : Ĉiuj Delegitoj kaj landaj
Perantoj de UEA

Redakcio :
7, Av. Léon-Gourdault
Choisy-le-Roi (Seine)
Francujo.

Administracio :
5, Bd. Stalingrad
Nice (A-M)

Instruista Letero—nova informilo de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. Per la praktika entuziasmo de S-ro Oskar Svantesson, la sveda komitatano de ILEI venas la urĝe bezonata kunligilo por ĉiuj aktivaj instruistoj. *La Letero* estas bonstila multobligita, kaj estos dissendata laŭ serio de dek numeroj, kiu kostas 4 svedajn kronojn. Oni publikigos rapide aktualaĵojn pri la lerneja laboro, ankaŭ raportojn kaj artikolojn. Estas necese pagi por minimume 10 numeroj, aŭ per poŝtmandato, monbileto, internaciaj kuponoj, premio-kuponoj de UL. Eble du personoj kune abonos. Redaktoro kaj administranto :—S-ro O. Svantesson, Skonertgatan 1, Göteborg Vr., Svedujo. Poŝtĝiro 6 22 52. Jen nepraĵo por ĉiuj instruistoj, kiu iĝos forta faka instigilo kaj kunligilo.

La Germana Federacia Fervojo sendas tre logan, delikate koloran faldfolion pri siaj servoj. Ĝi havas fotojn kaj grandan bildmaĵon pri la ĉefaj linioj en Germanujo. Ankaŭ la svisa fluginstanco "Swissair" sendas tre trafan koloran faldfolion.



La traduko apartenas al la grandaj faroj de nia literaturo.
F. Szilagyi

IBSEN: PEER GYNT

El la norvega tradukis E. A. Haugen

Prezo : bind. 15 ŝil., broŝ. 12ŝ. 6p., aŭfranko 9p.

Eldonis : ELDONA RONDO,
Boks 178, Trondheim, Norvegujo

Mendu ĉe via librovendisto aŭ ĉe

U.E.A., Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

VERAJ AMULET-REMEMORIGAĴOJ

de Afriko.

Nun estas haveblaj en malgranda kvanto amuletoj, kiuj protektas vin kaj donas al vi bon-sorton, se vi kredas je tio. Unu vera specimeno kaj la forsendado rekte al vi kostas nur 5 ŝil., unu 1 dolar-noton aŭ egalvaloron. Aĉetu hodiaŭ, kiam ili ankoraŭ estas aĉeteblaj.

E. L. Heilberg,
Poste Restante,
KITWE,
Norda Rodezio,
Centra Afriko.

